


**PAIVA NETTO** skribas "Karitato ĉe UN"

www.bonavolo.com

# BONA VOLO

JARKOLEKTO 27 • N-ro 72

ELEVAÇÃO

# ESPERANTO KIAL NE?

**Disvastigado kaj instruado de la Lingvo**

Temo de la 49-a Brazila Kongreso de Esperanto
(Florianópolis, Januaro/2014)

**ABORTIGO:** Fakulo pri molekulbiologio klarigas detalojn rilatajn al la komenco de la vivo en homa reproduktiĝo kaj la gravajn konsekvencojn de abortigo por korpa kaj mensa sano de virinoj.


PAIVA NETTO
Meditadoj EL LA ANIMO
Literaturo
por ĉiuj aĝuloj
Aĉetu la furoraĵon "Meditadoj el la Animo",
de la brazila verkisto Paiva Netto.
Skribu al esperanto@bonavolo.com

## TRAKTAJÔ PRI LA SPIRITE REVOLUCIA, NOVA ORDONO DE JESUO

Instruis Jesuo, la Ekumena Kristo, la Dia Ŝtatestro: *“Novan Ordonon Mi donas al vi: Vi amu unu alian, kiel Mi vin amis. Nur per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj, se vi havos Amon unu al alia. Se vi restadas en mi, kaj miaj vortoj restadas en vi, petu kion ajn vi volos, kaj tio estos farita por vi. En tio mia Patro estas glorata, ke vi donas multe da frukto; kaj vi estos miaj disĉiploj. Se vi observos miajn ordonojn, vi restados en mia Amo tiel same, kiel Mi observis la ordonojn de mia Patro kaj restadas en Lia Amo. Tion mi parolis al vi, por ke mia ĝojo en vi restadu, kaj via ĝojo estu plena. Jen estas mia Ordono: ke vi amu unu alian tiel same, kiel Mi vin amas. Neniu havas Amon pli grandan ol tio, ke iu demetus sian Vivon por siaj amikoj. Vi estas miaj amikoj, se vi faras tion, kion Mi al vi ordonas. Kaj Mi tion ordonas: vi amu unu alian, kiel Mi vin amis. Mi jam ne nomas vin sklavoj, ĉar la sklavo ne scias, kion lia sinjoro faras; sed Mi nomis vin amikoj, ĉar ĉion, kion Mi lernis de mia Patro, Mi sciigis al vi. Vi ne elektis min, sed Mi elektis vin, kaj starigis vin, por ke vi iru kaj donu bonan frukton, kaj ke via frukto daŭru; por ke la Patro donu al vi ĉion ajn, kion vi petos de Li en mia nomo. Tion Mi ordonas al vi: ke vi amu unu la alian, kiel Mi amas vin. Kiel la Patro min amas, tiel Mi ankaŭ vin amas. Restadu en mia Amo.”*

**(Aranĝita de Paiva Netto, akorde kun la Evangelio de la Kristo de Dio laŭ Johano, 13:34 kaj 35; kaj 15: 7, 8, 10, ĝis 17 kaj 9.)**


BONA VOLO

27-a jarkolekto • N-ro 72

ELEVAÇÃO

**BONA VOLO estas kvarmonata publikaĵo de LBV, eldonita de Eldonejo Elevação. Ĝi estas registrita per n-ro 18166, sur la libro “B” de la 9-a Notario pri Registro de Biloj kaj Dokumentoj de San-Paŭlo, Brazilo.**

**DIREKTORO KAJ ĈEFELDONISTO:** Francisco Periotto — MTE/DRTE/RJ 19.916 JP

**ĜENERALAJ KUNORDIGANTOJ:** Gerdeilson Botelho kaj Rodrigo de Oliveira

**SKIPO DE ELDONEJO ELEVAÇÃO:** Adriane Schirmer, Angélica Periotto, Camilla Lopes, Cida Linares, Fabiano Henrique, Felipe Duarte, Gabriela Marinho, Jefferson Rodrigues, Jéssica Botelho, José Roberto Tenório da Silva, Leila Marco, Letícia Rio, Lísia Peres, Maria Aparecida da Silva, Neuza Alves, Paulo César Pereira, Paulo Sergio Viana, Raquel Bertolin, Rosana Bertolin, Walter Periotto kaj Wanderly Albieri.

**KOVRILO:** Diego Ciusz

**GRAFIKA PROJEKTO KAJ KOMPOSTADO:** Diego Ciusz kaj Helen Winkler



**ĈIUJ RAJTOJ DE TIU ĈI ELDONO REZERVITAJ DE ELDONEJO ELEVAÇÃO:** Rua Doraci, 90 • Bom Retiro • São Paulo/SP • Brasil [Brazilo] • CEP 01134-050 • Tel.: (+55 11) 3225-4969 • www.bonavolo.com



4 **Mesaĝo de Paiva Netto** | Karitato ĉe UN

7 **LBV ĉe UN** | En la internacia laborprogramo

10 **Leteroj kaj retpoŝtoj** | Esperantistoj skribas al BONA VOLO

12 **Registro** | Vizitoj kaj celebrado

18 **Literaturo** | “Enciklopedio pri Spiritualeco”

22 **Bona Volo en la mondo** | Internaciaj komunikiloj kunhavigas mesaĝojn por Vivo

24 **Kovrilo** | Esperanto, kial ne?


27 **Edukado** | Pedagogio por Paco

32 **Esperanto tra la mondo** | Esperanta novaĵservo

34 **Sano** | Respekto al komenciĝanta vivo

38 **Junula Agado LBV** | Spirita Inteligento

44 **Soldatetoj de Dio** | Studado kaj aktivecoj


4




17




38



UN Photo/John Isaac

# KARITATO ĉe UN


João Preda

José de Paiva Netto, verkisto, ĵurnalisto, radioprelegianto, komponisto kaj poeto. Li naskiĝis je la 2-a de marto 1941, en Rio-de-Ĵanejro/RJ, Brazilo. Li estas direktoro-prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV). Estas aktiva membro de Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI), de Brazila Asocio de Internacia Gazetaro (ABI-Inter), ano de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj), de International Federation of Journalists (IFJ), de Sindikato de Profesiaj Ĵurnalistoj de Subŝtato Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Verkistoj de Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Radiokomunikantoj de Subŝtato Rio-de-Ĵanejro, de Brazila Uniuĝo de Komponistoj (UBC) kaj de Beletra Akademio en Centra Brazilo.

La reprezentanto de LBV ĉe UN, **Danilo Parmegiani**, informas al ni, ke Unuiĝintaj Nacioj celebris je la unua fojo la Internacian Tagon de Karitato. Ĵus aprobita rezolucio fiksis la daton por la 5-a de septembro.

UN asertas, ke Karitato povas kontribui por dialogo inter homoj el malsamaj civilizacioj, kulturoj kaj religioj, same kiel por solidareco kaj reciproka interkompreno. Kaj ĝi rekonas la klopodadon de karitatorganizoj kaj individuoj koncerne tiun celon.

## Karitato subtenas la homan vivon

Ĝi estas ofta temo de miaj artikoloj — kaj troviĝas en la publikaĵoj senditaj al UN, en pluraj lingvoj, kiel *Paco por la Jarmilo* (2000), *Solidara Socio* (2000), *Tutmondigo de la Frata Amo* (2007), BONA VOLO *Virino* (2009), BONA VOLO *Ekonomia+Socia+Media* (2012) kaj BONA VOLO *Daŭripova Elvolviĝo* (2013) —, ĉar mi konsideras ĝin nemalhavebla por nia postvivado. Mi kaptas la okazon por tuj proponi al vi malgrandan pecon de la verko *La Kapitalo de Dio*, kiun mi tre zorge preparas nuntempe, kaj per kiu mi prezentas kelkajn prelegojn, kiujn mi faris ekde la jardeko post 1960:

Ni meditu pri ĉi tiu peco el Apostolo **Johano**, en lia Unua Epistolo, 4:20: *“Se iu diras: Mi amas Dion, kaj malamas sian fraton, tiu estas mensoganto; ĉar kiu ne amas sian fraton, kiun li vidis, tiu ne povas ami Dion, kiun li ne vidis”*.










Fotoj: Arkivo BV

(1) UN proklamis la Internacian Tagon de Karitato (je la 5a de septembro) cele al mobilizo de popolo kaj civitanaro por helpi similulon. (2) Reprezentantoj de LBV partoprenis kunvenon de Unuiĝintaj Nacioj kiu difinis la memorigan daton. Ekde maldekstre, **Alziro de Paiva**, **Gizelle de Almeida** kaj **Danilo Parmegiani**.

Eduarda Pereira






La ĝenerala sekretario de UN, **Ban Ki-moon**, esprimis sian apogon al laboro de LBV subskribante la kovrilon de *Globalization of Fraternal Love* (la revuo *Tutmondigo de la Frata Amo* estis unue eldonata portugale, angle, france kaj esperante) dum jara kunveno de Ekosok, nome Pintkunsido 2007, en la oficejo de UN, en Ĝenevo, Svislando.

Arkivo BV



Danilo Parmegiani (dekstre), de LBV, kunhavigas la sperton de tiu Institucio helpe al familioj kun malalta mongajno, dum intervjuo al Radio UN, gvidata de la ĵurnalisto **Eleutério Guevane**.


Karitato, kreaĵo de Dio, estas la sento, kiu subtenas la vivantan Homon en turmentaj momentoj en lia vivo. Se Vi diros al mi, ke vi ne bezonas Amon, tiam vi eraras, aŭ vi estas malsana... Resume, temas simple pri ĉi tio: Amo, sinonimo de Karitato, kiun tiom multe bezonas la miopa socio, konfuzata de perfida kulturo, subtene de homoj, kiuj kaŭzis al popoloj malfeliĉojn, kiuj sangmakulis la Historion kaj nin endanĝerigas konstante. Ĝis kiam?!

Karitato subtenas la homan vivon. Ĵurnalisto **Francisco de Assis Periotto**, aŭskultinte ĉi tiujn miajn parolojn, jene kompletigis ilin: *"per pano kaj deco"*.

## Alta socia spirito

Teknologia progreso konstante faligadas multajn limojn kaj faras, ke iuj limoj falu sur aliaj. Interalie, temas pri ekonomiaj kaj sociaj limoj. Tamen, tutmondigo ne baros diversecon. Ĉar se oni tutmondigas, oni ankaŭ donas al regionaĵoj la eblecon sin montri. Laŭ pluraj manieroj, ĉiu homo influas ĉiun homon. Sed limoj en diversaj lokoj en la mondo, ankoraŭ pligrandigas la distancon inter riĉuloj kaj malriĉuloj. Tio povas kaŭzi profundajn konsekvencojn, je internacia nivelo, kiel okazis ĉe la fino de la Romia Imperio. Ĉi-foje, tamen, tiaj transformiĝoj povos kaŭzi tute novajn reagojn eĉ flanke de ŝtonaj koroj, kiuj antaŭe estis kontraŭaj al la pragmata spirito de Karitato, kiuj akceptos la penson, ke ekzistas esence gravaj aferoj, eĉ por ili, kiel ekzemple... kunsentemo. (...) Karitato ne estas vulgara sentimentalemo, al kiu iuj homoj emus redukti ĝin. Trafe do skribis la granda **Joaquim Nabuco** (1849-1910): *"Fronte al la batalo por la vivo, kiu estas Natura Leĝo, Religio proponas Karitaton, kiu estas batalo por aliula vivo"*.

Reproduktto BV




Joaquim Nabuco

Ĉu ne tiu estas la funkcio de vera politikisto? Kio estus pli grava por la plifortigo de komunumoj ol tia alta socia spirito?

Estas same eble, ke ni esperu, el la alta signifo de Karitato, en la ĉiutaga sinteno, kompletan vojon al vera sendependiĝo de ĉiu ajn nacio.

Karitato estas serioza temo. ●

paivanetto@lbv.org.br
www.paivanetto.com/esperanto


Shutterstock.com


Sidejo de UN, en Novjorko, Usono.

# En la internacia laborprogramo

Jéssica Botelho

La 5an de septembro 2013, Legio de Bona Volo partoprenis la eventon de lanĉo de la Internacia Tago de Karitato, en la sidejo de Unuiĝintaj Nacioj, en Novjorko, Usono. La programo konsistis el du diskutaranĝoj pri graveco de civitanaro por disvolviĝo, same kiel pri la rolo de Karitato por redukto de malriĉeco.

La dato estis elektita de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj por promocii dialogon, solidarecon kaj interkompreniĝon. Per ĉi tiu iniciato, la organizaĵo esperas realigi edukajn kaj konsciigajn aktivadojn en la mondo apoge al homama laboro. La tago 5a de septembro aludas al la datreveno de forpaso de **Patrino Tereza el Kalkuto** (1910-1997), ricevanto de Nobel-premio pri Paco en 1979, kaj ikono de helpo al la plej malriĉaj kaj vundeblaj personoj.


Reprodukto BV

Patrino Tereza el Kalkuto

Per mesaĝo sendita de la ĝenerala sekretario de UN, Ban Ki-moon, al la partoprenantoj de la konferenco, li asertis ke: *"En la momento kiam ni volas akceli niajn klopodojn por atingi la Jarmilajn Evoluigajn Celojn kaj difini aŭdacan laborplanon por la post-2015a periodo, la rolo de Karitato povas kaj devas kreski"*.

En la okazo, la reprezentanto de LBV ĉe UN, Danilo Parmegiani, partoprenis la diskuton kaj reliefigis al ĉiuj la vastan signifon de Plena Karitato (legu pli sur la

Fotoj: Nicholas de Paiva









(1) La interveno fare de la reprezentanto de LBV, Danilo Parmegiani, estis samtempe elsendata de TV UN. (2 kaj 3) Unu tagon post kreo de la speciala dato kiu celebras Karitaton, la reprezentanto de la 67a Ĝenerala Asembleo de UN, **Vuk Jeremić**, elparolas dum la dua eldono de la Altnivela Forumo pri Kulturo de Paco, en la sidejo de Unuiĝintaj Nacioj, en Novjorko.

paĝo 9) kaj ĝia transforma rolo. *"Mi ŝatus gratuli al Unuiĝintaj Nacioj pro la estigo de ĉi tiu dato tiel grava. Kiel reliefigas la ĉefgvidanto de LBV, José de Paiva Netto, Karitato estas multe pli ol nur havigi teleron da manĝo (...). Ni kredas ke Karitato estas sinonimo de Amo, same kiel strategia ilo por subteno de la Vivo. Tiel, se la personoj efektive komprenos tion, ni povos realigi multajn aferojn. Kaj la sperto de Legio de Bona Volo pruvas tion, ĉar ĝi estas subtenata de kunlaborantoj kaj volontuloj, entute ĉirkaŭ 30 mil volontuloj, havigante 10 milionojn da asistoj ĉiujare".*


La reprezentanto de LBV ankaŭ reliefigis la gravecon de Karitato kadre de plenumo de laborprogramo pri elvolviĝo de UN. *"Ĉar nun ni debatas pri la evoluiga celaro post 2015, kun kiuj ĉiuj landoj devas sin devontigi, la civitanaro komprenas ke, se ni klarigos kaj konsciigos la mondon rilate la gravecon de Karitato en la internacia laborprogramo, ni povos efektive kontribui al atingo de tiu celaro pli facile",* li konkludis.

La evento estis aranĝita de Permanenta Misio de Hungario ĉe Unuiĝintaj Nacioj, proponinto de la rezolucio, kaj ĝin apogis oficialaj organoj de UN: Departemento pri Publika Informado (DPI), Programo de Unuiĝintaj Nacioj por Disvolviĝo (PNUD), Oficejo de Unuiĝintaj Nacioj por Partnerecoj (UNOP) kaj Fondaĵo de Unuiĝintaj Nacioj (UNF).

Fotoj: Nicholas de Paiva



1



2



3



4

La junulino **Sâmara Malaman**, de LBV, liveras la revuon BONA VOLO *Daŭripova Elvolviĝo*, en la angla, al (1) **Hugh Evans**, kunfondinto kaj ĝenerala direktoro de Global Poverty Project (movado kontraŭ ekstrema malriĉeco en la mondo), (2) **Guy Djorken**, plenuma direktoro de Centro de Unesko por Paco, (3) **Kadri Özen**, direktoro de publikaj rilatoj de Coca-Cola por Eŭrazio kaj Afriko, kaj (4) **Kathy Calvin**, prezidanto kaj ĝenerala direktoro de la Fondaĵo de Unuiĝintaj Nacioj.

# Plena Karitato

Jam de pli ol ses jardekoj, Legio de Bona Volo defendas sian avangardan tezon pri Plena Karitato, lanĉitan de la fondinto de tiu Institucio, **Alziro Zarur** (1914-1979). La praktiko de tiu koncepto signifas, kiu strebas iri trans la materia helpo, kaj valorigas la individuon en lia tuteco, tiel ke li ricevu la tutan bezonatan helpon por restariĝi kaj ŝanĝi sian propran realaĵon.

Kredante ke neniu lando progresas se ĝia popola estas senhelpa, LBV fundamentas ĉiujn siajn sociedukajn aktivecojn, programojn kaj projektojn sur la principo de la Plena Karitato. Tiu laboro, internacie rekonata, estis menciita de Patrino Tereza el Kalkuto. La karmemora misiistino, okaze de inaŭguro de la Monda Parlamento de la Ekumena Frateco (ParlaMundi de LBV), en 1994, en Braziljo, ĉefurbo de Brazilo, gratulis la ĉefgvidanton de Legio de Bona Volo pro la iniciato:

*"Estimata S-ro José de Paiva Netto, mi transdonas al vi miajn preĝojn por ĉiuj. Benoj de Dio estu ĉe vi en Legio de Bona Volo, kaj multaj homoj ekkonu la Amon de Jesuo pere de Monda Parlamento de la Ekumena Frateco kaj konservu vivanta la Bonan Mesaĝon de Lia Amo en la mondo, amante unuj la aliajn, same kiel Li amis nin. Dio vin benu".*



Diskonigo

"Karitato plenumas gravan rolon por apogo al valoroj kaj laboro de Unuiĝintaj Nacioj. Donacoj de tempo aŭ mono; memvola engaĝiĝo en unu el siaj komunumoj mem aŭ en la alia flanko de la mondo; karitataj kaj bonkoraj agoj senatende al rekompencoj; tiuj kaj aliaj esprimoj de monda solidareco helpas nin en nia kundividata serĉado por vivi harmonie kaj konstrui pacan mondon por ĉiuj. Mi salutas ĉi tiun unuan celebron de Internacia Tago de Karitato."

**Ban Ki-moon**
Ĝenerala Sekretario de UN

"Saluton karaj LBV-anoj, geesperantistoj kaj eldona skipo. Gratulojn al LBV pro la Esperantaj publikaĵoj, ĉefe pro la enhavo kaj altnivelaj aspektoj de viaj materialoj."

**Ciro Gomes (Brazilo)**



"Karega sinjoro verkisto, ĵurnalisto, predikanto José de Paiva Netto. Dio Ĉeestas — kore ni salutas vin! Okaze de la 57a jaro da fruktodona laborado favore al la necesbezonuloj, ni sincere kaj Kristane prezentas niajn plej profundajn admiron kaj gratulojn al karega Paiva, pro la eksterordinara tasko kiun li plenumas en nia lando, inkluzive, eksterlande. Oni povas diri: tutmonde. Tute je Via dispono, ni restas. Frate kaj Amike, Vivu Jesuo en niaj koroj por ĉiam. Amen!"

**José Saraiva Matos (Brazilo)**



"Tre bela kaj enhave riĉa magazino! Mi kun granda intereso legis ĝin. Ankaŭ nepriproĉebla lingvouzo. (...) Dankon por doni la eblecon al la mondo, legi pri viaj atingoj kaj laboro!"

**Ivo Schenkel (Belgio)**

"Al la estiminda direktoro-prezidanto de LBV, s-ro Paiva Netto, gratulon por via 57-jara konstanta memdediĉo al tiu vera apostolado, en tiel speciala institucio kia LBV, fondita de la neforgesebla [Alziro] Zarur! Antaŭ nelonge mi iris kun sudkorea esperantistino al granda lernejo de LBV, en Rio — kaj same mi kiel la vizitantino estis tre bone impresataj de la ĝojo kaj viveco de la infanoj, la rimarkeble vera amo de la instruistinoj kaj aliaj oficistoj de tiu institucio. Krome, lastatempe, kelkfoje, frumatene, mi aŭskultis plurajn programojn de la radiostacio de LBV — kaj mi opinias tiun programaron bonega, inkluzive de tiuj kun la infanoj. La sonrimedoj de la radielsendejo estas tiel dinamikaj kaj esprimplenaj, ke ni eĉ ne sentas la mankon de la televidaj bildoj. La mesaĝoj, intervjuoj, novaĵoj, muzikoj — ĉio teknike kaj spirite plej altnivela. Mi opinias aparte feliĉa la frazon laŭ kiu 'LBV naskiĝis por ami kaj esti amata'... Ke LBV, vi kaj ĉiuj viaj fidelaj kunlaborantoj do plue kuniru, privivantaj tiun belan sperton ami kaj esti amataj! Brakumojn!"

**Jair Salles (Brazilo)**



"Tre kara kaj altestimata s-ro Paiva Netto! Vi nun kompletas la unuajn 57 jarojn de via fruktodona laboro, eĉ laborego, de Legio de Bona Volo por la plibonigo de la vivkondiĉoj de la enkarniĝintoj sur la Tero. Helpe de la bonaj elkarniĝintoj en la Spirita Mondo vi certe sukcesas en viaj taskoj. Permesu al mi gratuli vin el mia tuta koro kaj humile gratuli vin pro via granda laboro, kiu ĉiam portas fruktojn al ni ĉiuj. La homaro dankas vin, same kiel la liberaj spiritoj en la ĉielo! Koran dankon pro ĉio, kion vi faras. Dio benu vin ĉiujn, plej amike."

**Bob Felby (Aŭstralio)**



"Mia respektinda kaj kara amiko Sinjoro Paiva Netto, al vi mi sincere salutas el la malproksima fora lando Japanio kaj elkore gratulas pro viaj grandaj laboroj kaj kontribuoj por la paco de la mondo, por la feliĉo de la homaro kaj por la interreligia agado sur la Tero, ja dum 57 jaroj. Mi kredas ke via merito trabrilos tra la mondo."

**Ŝigeki Maeda (Japanio)**

"Karega s-ro Paiva Netto,
Mi havas la honoron kore saluti vin okaze vian 57 jaran sindonan, fruktodonan, pacan luktadon kaj apogon de Esperanto. Mi klinas je la nomo de Esperantista societo 'Kolombo de la paco' u. Galabovo, Bulgario kaj de mia persona nomo pri via senlaca laboro por la paco kaj la disvastigo de Esperanto sur la Tero. Profundkore mi bondeziras al vi sanegon por ke vi havu eblecon daŭrigi vian noblan agadon.
Kun plej kora estimo."

**Kanjo Kanev (Bulgario)**



"Estimata Sinjoro kaj Kara Frato José de Paiva Netto,
Gratulon kaj dankon pro via 57-jara luktado por amo kaj paco.
Amike."

**Roman Dobrzyński (Pollando)**



# Dankon al ĉiuj samideanoj



**Pro neebleco publikigi ĉiujn retpoŝtajn mesaĝojn kaj leterojn senditajn al la ĉefgvidanto de LBV kaj al revuo BONA VOLO, ni dankas, per ĉi tiu eldono, kelkajn el ili kiel maniero reprezenti ĉiujn: (Albanio)** Bardhyl Selimi; **(Argentino)** Roberto Sartor; **(Aŭstralio)** Franciska Toubale, Owen Loneragan, Roger Springer, Ŝandor Monostori; **(Aŭstrio)** Ernst Quietensky Jr.; **(Belgio)** Germain Pirlot, Heidi Goes, Seán Ó Riain; **(Brazilo)** Aloísio Sartorato, Carlos Dmitri Vasconcelos, James Rezende Piton, Josenilton Passos do Nascimento, José Roberto Ruiz, Josias Aparecido de Andrade, Victor César; **(Britio)** David Curtis, Viv O'Dunne; **(Bulgario)** Dimitrinka Kateva, Georgi Mihalkov, Serafim Serafimov; **(Ĉeĥio)** Jaroslav Karhan, Josef Krob, Miroslav Malovec; **(Ĉinio)** Hao Weining, Lilia, Sun Dachen, Xiong Zhouxuan; **(Danlando)** Ileana Schrøder; **(Demokratia Respubliko Kongo)** Viktor Lufimpu; **(Estonio)** Ester Pütsepp, Madis Linnamägi; **(Finnlando)** Anja Launiainen, Raita Pyhälä; **(Francio)** Daniel Durand, Frédéric Lauriol, Stéphane Robert; **(Germanio)** Alicja Lewanderska-Quednau, Manfred Westermayer, Ronald Schindler, Ulrich Lins; **(Grekio)** Maria Pontika; **(Hispanio)** Teresita I. Alaniz; **(Hungario)** Anna Bartek, Adrienne Pásztor, Gregory Flender, Imre Ferenczy, Imre Szabó, István Gulyás, László Horkay, Péter Tihanyi; **(Italio)** Ermigi Rodari, Luigia Oberrauch Madella, Pino Lalli, Renato Corsetti; **(Japanio)** Akiumi OKABE; **(Kanado)** Raymond Briseboi; **(Kenjo)** Julius Kirwa; **(Kubo)** Eduardo Robert Sanchez, Maritza Gutierre; **(Nepalo)** Mukunda Raj Pathik Wagle; **(Pakistano)** Altaf Gohar Khan; **(Pollando)** Andrzej Pettyn; **(Portugalio)** Manuel José Pinguinha; **(Rumanio)** Jolanda Józsi, Julia Sigmond, Mariana Berariu, Mihai Trifoi; **(Rusio)** Vladimir Romanov; **(Senegalo)** Antoine Gomi; **(Slovakio)** Magdaléna Feifičová; **(Svedio)** Ann-Louise Åkerlund; Christer Kiselman; **(Taĝikio)** Firdaus Ŝukurov, Saidmurod Hoĝazod; **(Tanzanio)** David Mapengo; **(Togolando)** Adjévi Adje; **(Ukrainio)** Olga Bauer, Olga Skobeev; **(Usono)** Angelina Taremi, Joan Philips, William Harmon.



Vivian R. Ferreira

# La atleto Walter Fontes vizitas LBV-on en Rio-de-Ĵanejro

La 19an de septembro 2013, la lernantoj de la Eduka Centro José de Paiva Netto, de Legio de Bona Volo, en Rio-de-Ĵanejro, Brazilo, akceptis la viziton de la esperantista kuristo Walter Fontes, veterana diskoniganto de Esperanto en enlandaj stratkuradoj kaj eksprezidanto de Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵanejro (AERĴ).

Ĉe sia enveno en la edukejo, kie ĉiutage oni gastigas, plentage, centojn da geknaboj, la atleto estis akceptita de la Ekumena Infana Koruso "Bona Volo". *"Tio ja estas granda emocio. Mi preskaŭ ploris, ĉar ilia spontaneco, klareco kaj ankaŭ la muziko tre kortuŝas. Estas granda emocio ĝui tiun donacon per kiu mi estis regalata hodiaŭ,*






Fotoj: Nathália Valério



**1)** Ĉe sia enveno en la Eduka Centro de LBV, la esperantisto estis akceptita de la Ekumena Infana Koruso "Bona Volo", konsistanta el lernantoj de tiu Institucio. **2)** Dum la vizito, Walter Fontes parolis kun la edukantoj de LBV pri Esperanto.

*ĉar ĝi impresas bone kaj tre granda estas la ĝojo povi ĉeesti ĉi tiun lokon, koni tiun laboron faratan por la infanoj. Ni vidas ke ili kantas kun la koro"*, li diris.

Sekve, Walter Fontes trairis la mediojn de la Eduka Centro José de Paiva Netto kaj propraokule konis la laboron disvolvatan de tiu Institucio en Rio-de-Ĵanejro. *"La strukturo estas mirinda. Oni sentas ian gravan zorgemon por ke la infanoj havu kompletan asistadon — psikologian, kuracistan kaj dentistan. Min tre impresis kaj mi trovis tre bela la laboron disvolvatan ĉi tie"*, li refiefigis.

Ekde sia fondo, Legio de Bona Volo diskonigas Esperanton kaj uzas ĝin kiel ilon por disvastigi sian mesaĝon de amo, paco kaj frateco. *"Mi lasas ĉi tie mian inviton por ke la personoj venu koni tiun laboron, ĉar sendube ankaŭ ili emociiĝos, kiel okazis al mi. Mi ŝatus memorigi pri la laboro de LBV rilate Esperanton, kiun mi akompanas dum tiu longa tempo — la retejo, la revuo, la esperantistoj, la libroj —; ĝi estas mirinda"*, aldonis la vizitanto, kiu estas ano de AERĴ.

Fine de sia vizito, Walter Fontes registris en la Libro de la Koro: *"Aŭdi la infanojn kantantajn kaj ricevi de ili aman brakumon estas tre grave. Ni levu niajn pensojn al tiuj fortoj laborantaj por la harmonio de la universo kaj al la Kreanto de ĉiuj aferoj por ke Li ĉiam ĉeestu en la agado de tiu grava institucio. Pacon, Amon kaj Prosperon!"*.

En Rio-de-Ĵanejro, la Eduka Centro José de Paiva Netto, de Legio de Bona Volo, situas ĉe avenuo Dom Hélder Câmara, 3059 — Del Castilho. Por pliaj informoj, telefonu: (+5521) 3297-7100.

**SPEKTU LA VIDEON!**

QR Code: Fotu la kodon kaj vidu filmeton pri la vizito.

Fotoj: Nathália Valério






# Vizito de la brazila esperantisto Evandro Caboclo

La esperantisto Evandro Caboclo, multjara amiko de la Institucio, ankaŭ vizitis la Edukan Centron José de Paiva Netto en Rio-de-Ĵanejro. Impresita pri la bona kvalito de la edukejo de LBV, kiu havas ĉiujn rimedojn necesajn por akcepti infanojn vivantajn en situacio de socia risko, s-ro Evandro registris siajn impresojn pri la vizito, per retmesaĝo sendita al la Institucio: *"Mi restis tre kontenta kaj kortuŝita, vidante infanojn tiel edukitajn, simpatiajn, kaj la tutan grandan kaj zorgatan strukturon de la Eduka Centro José de Paiva Netto. Kiu ankoraŭ ne vidis, tiu bezonas vidi"*.

Caboclo estas aktivulo por la internacia lingvo kreita de Zamenhof. Per subteno de la Sekretariejo pri Kulturo de la urbo Rio-de-Ĵanejro, li disponigas al la loĝantaro lecionojn de la baza kurso de esperanto en Kultura Biblioteko Cruz e Souza, krom aliaj iniciatoj favorantaj la esperantistan movadon.

La aktivulo ankaŭ diris ke li pretas apogi la diskonigo-laboron pri la agadoj de LBV ĉe la enurba esperantista komunumo: *"Mi sugestos al la grupoj de Esperanto, en Rio, ke ili periode vizitu la Edukan Centron José de Paiva Netto. La ideo estas proksimigi pli kaj pli la fratajn ligilojn inter esperantistoj kaj LBV"*.

Ankaŭ vi estas tre bonvena al la Eduka Centro José de Paiva Netto, de Legio de Bona Volo en Rio, situanta ĉe avenuo Dom Hélder Câmara, 3.059 — Del Castilho. Por pliaj informoj, skribu al ni: esperanto@bonavolo.com.

**VIDU KIU ANKAŬ PASIS TIE!**

QR Code: Fotu la kodon kaj spektu filmetojn.

# LBV kunfratiĝas kun reprezentanto de UEA en Ĝenevo





Fotoj: Adriana Parmegiani

**Spektu la intervjuon!**
Por spekti la intervjuon de sinjoro Stefano Keller, elŝutu la QR-Kodon en vian plurfunkcian telefonon kaj fotu la kodon.

En la unua semajno de julio 2013 (de la 1a ĝis la 4a), Legio de Bona Volo partoprenis en la Altnivela Kunsido de la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de Unuiĝintaj Nacioj (Ekosok), en Palais des Nations en Ĝenevo (Svislando).

Tiam la teamo de LBV okazigis agrablan renkontiĝon kun s-ro **Stefano Keller**, estrarano de UEA pri Eksteraj Rilatoj kaj ĉefreprezentanto de UEA ĉe UN en Ĝenevo. Ĉiokaze li ricevis de reprezentantoj de LBV ĝiajn publikaĵojn en la franca kaj esperanta lingvoj.

La renkontiĝo inter s-ro Keller kaj LBV estas reliefigita de s-ino **Verena Graf**, de UEA. Ŝi informas, ke *"jam ekzistas kunlaboro inter la du NRO-j: la Novjorka UEA-komisiitaro havas okazojn al komunaj aranĝoj en la Novjorka oficejo de LBV"*.



André Fernandes

# Frata renkontiĝo

## Ekskprezidanto de Brazila Esperanto-Ligo vizitas la Templon de Paco

La Templo de Bona Volo (TBV) akceptis julie 2013 la honoran viziton de d-ro **Carlos Alberto Alves Pereira**, tiama prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo (BEL), kies sidejo situas en la ĉefurbo de Brazilo.

La eksprezidanto de BEL trairis ĉiujn lokojn de la Templo de Paco kaj povis observi la uzon de Esperanto en la komunikado inter TBV kaj ties vizitantoj. Eblas trovi en la interno de TBV multe da informa materialo en la tutmonda lingvo, klariganta pri la kulturaj trajtoj kaj Ekumena Spiritualeco en la monumento plej vizitata en la brazila ĉefurbo, laŭ oficialaj datumoj de la Ŝtata Sekretariejo pri Turismo de la brazila ĉefurbo.

Fine de sia vizito, d-ro Carlos dum intervjuo al *Superreto Bona Volo pri Komunikado** parolis pri la aktivadoj de la esperanta movado en Brazilo. *"La Brazila Esperanto-Ligo estis fondita en 1907 kaj de tiam ĝi kunordigas la disvastigon de la Esperantilingvo en Brazilo (...) Ni okazigas ĉiujare la Brazilan Kongreson de Esperanto. Ĉijare* [2013] *ĝi okazis en la urbo Barra do Garças, en la ŝtato Mato Grosso. La urbo Florianópolis, en la ŝtato Santa Catarina, okazigos la venontan Kongreson en januaro 2014."*

Ĉiokaze li ankaŭ registris vortojn je apogo kaj konsidero al la laboro de LBV rilate la lingvon internacian Esperanto, kiun ĝi ofte uzas kiel komunikkanalon kun siaj korespondantoj en la tuta mondo. *"Ekde sia komenco, LBV senĉese*



Arkivo BV

D-ro Carlos Alberto Alves Pereira (dekstre) okaze de sia vizito al la Templo de Bona Volo kaj Eduardo Almeida, de TBV.

*subtenis la esperantistan celagadon kaj eĉ havas Fakon pri Esperanto, kiu ĉiam helpas la diskonigadon de la lingvo. Estas grava la agado de LBV, ia konstanta laboro, bonkvalita (...). Kaj ni sentas honorita pro tiu duflanka kunlaborado"*, li reliefigis.

La Templo de Bona Volo situas ĉe SGAS — Lotes 75/76. Por pliaj informoj telefenu al (+5561) 3114-1070.

* **Superreto Bona Volo pri Komunikado —** Nomo rilatanta al la Komunikiloj 100% Jesuo: Superreto Bona Volo de Radio, Bona Volo TV (Kanalo 20 ĉe SKY), Portalo Bona Volo kaj la publikaĵoj pri Ekumena Spiritualeco.

# Vivu Esperanto!

## LBV memorfestas la 126-jariĝon de la internacia lingvo

La 26an de julio 2013 ni memorfestis la 126-jariĝon de Esperanto, kiu estis oficialigita post la lanĉo de la unua gramatika libreto pri la nova lingvo sub la titolo *La Lingvo Internacia*, en 1887. De tiam, la nombro da esperantistoj estas kreskinta, same kiel la verkoj, kiuj ekuzis Esperanton kiel originalan lingvon.

Kiel simplan omaĝon al tiu dato tiel speciala, la Departemento pri Esperanto de Legio de Bona Volo mobilizis grupon de gelernantoj de la Instituto pri Edukado José de Paiva Netto, en San-Paŭlo (Brazilo), por memorfesta foto en la korto de la lernejo.

La Infana Koruso de LBV ne volis resti sen partopreno: malgraŭ la lerneja ferio, ili provludis la muzikon "Gratulon al vi" sub direkto de la muzikestro kaj instruisto **Nilton Duarte**, kaj ili pretigis filmeton kun multe da ĝojo kaj entuziasmo, en la muzika spaco de la Eduka Ensemblo Bona Volo, en San-Paŭlo.

Krome, la Tago de Esperanto estis vaste diskonigita en la programado de Superreto Bona Volo pri Komunikado (radio kaj TV), per kiu la parolistoj de la ĉefaj ĉiutagaj programoj (tutmonde elsendataj per la interreto) iom rakontis pri la historio de la lingvo internacia kaj pri ĝia kreinto Zamenhof al siaj aŭskultantoj kaj televid-spektantoj.






Fotoj: Vivian R. Ferreira

Ambaŭ omaĝojn oni aperigis en la Portalo Bona Volo (www.bonavolo.com) kaj en la oficiala paĝaro de Bona Volo ĉe Facebook kaj YouTube, kio bone eĥis enlande kaj alilande.

**Spektu la videon!**
QR Code: Fotu la kodon kaj vidu filmeton pri la omaĝo fare de la Infana Koruso de LBV.

Kaj vi? Kion vi kaj/aŭ via asocio faris por memorfesti la Tagon de Esperanto en via lando? Sendu foton al esperanto@bonavolo.com.



# “Enciklopedio pri *Spiritualeco*”


## Legantoj tutmonde komentas pri la beletra verko de Paiva Netto en la internacia lingvo

La instruoj entenataj en la libro *Meditadoj el la Animo*, de aŭtoreco de la verkisto Paiva Netto, plu estas reliefigataj de legantoj en la tuta mondo. Post la sukceso en Brazilo kaj Portugalio, la verko atingas la mondon pere de la lingvo internacia Esperanto. La kvalito de la teksto kaj la profundeco de instruoj prezentitaj de tiu brazila aŭtoro, kun pli ol 5 milionoj da libroj venditaj, pravigas tian reeĥon. Per ĉi tiu verko la aŭtoro montras la transcendeblecon de Politiko, de Scienco, de Religio, de Ekonomio, de Arto, de Sporto, fine de la socia vivo. Prezentitaj laŭ simpla maniero, tiuj gravaj lecionoj samtempe kaj neforgeseble kortuŝas la leganton.

*“Tiu ĉi libro helpas provi al ĉiuj, kiuj ankoraŭ ne trovis la pacon en sia propra animo. Meritas atente legi ĝin! Kaj mediti el la animo”*, rekomendas s-ino **Julia Sigmond**, emerita aktorino de pupteatro kaj delegito de Universala Esperanto-Asocio (UEA), el Rumanio.

Per recenzo de sia aŭtoreco, ŝi venigas la unuajn impresojn pri la verko: *“De la unua rigardo la kovrilpaĝo kun la aŭrigitaj literoj de la titolo okulfrapis min. Bonŝance ne nur la kovrilpaĝo aspektas riĉe, sed ankaŭ la enhavo estas riĉega. Kaj kun granda ĝojo mi povis konstati, ke mi ne trovis en la libro eĉ unu preseraron”*.

En *Meditadoj el la Animo*, la aŭtoro uzas oportunajn eldirojn de tutmondaj gravuloj kiuj, pere de sia ekzemplo, kontribuis al evoluo de la Homaro. Pri tio, komentas la aktorino: *“Paiva Netto elektis ĉi tiujn pensojn skribitajn de la a.K.-a tempo*




## Furoraĵo!


La brazila kaj la portugalia eldonmerkato kune respondas por pli ol 400 mil ekzempleroj venditaj de la libro *Reflexões da Alma* [Meditadoj el la Animo]. Krome, la verko furoris en gravaj beletraj eventoj, enlande kaj alilande, kiel en la 80a Libro-foiro de la urbo Porto (Portugalio), en la jaro 2010. Per tio, ĝi allogas legantojn en Eŭropo ekde la lanĉo de la speciala eldono, en 2008, pere de la eldonejo Pergaminho. La esperanta versio de la verko estis lanĉita en julio 2011, okaze de la 8a Tutamerika Kongreso de Esperanto, okazinta en la ĉefurbo San-Paŭlo, en Brazilo.

*ĝis hodiaŭ vivantaj homoj en la tuta mondo. En liaj diversaj paroladoj kaj libroj feliĉe li uzas tiun vere nemezureblan riĉecon de la pensoj, pri kiuj, fakte pri ĉiuj, eblas meditadi".*

Kaj kompletigas: *"Cetere la libro plenas de meditaĵoj de la aŭtoro. Estas sentebla, ke Paiva Netto trovis la sencon kaj la celon de sia vivo mem, kaj forte li intencas helpi la homaron por same trovi ĝin. Tiu bonvola helpemo radias ankaŭ de lia milda rideto sur la lasta kovrilpaĝo de la libro 'Meditadoj el la Animo'".*

> "Tiu ĉi libro helpas provi al ĉiuj, kiuj ankoraŭ ne trovis la pacon en sia propra animo. Meritas atente legi ĝin kaj mediti el la animo."

Persona arkivo



De Rumanio, s-ino Julia Sigmond, emerita aktoro de pupteatro kaj delegito de Universala Esperanto-Asocio.

Persona arkivo



La inĝenierino Margarita Savova, prezidanto de Esperanta Asocio "Libero", de Bulgario.

"Paiva Netto estas granda spirita instruisto de la homaro. Tio signifas, ke li vidas pli longe kaj pli profunde de siaj nuntempuloj. [. . .] La aŭtoro ektuŝas delikate dian peceton en la koro de la homo. Li rigardas la homon ne nur kiel materia estaĵo, sed precipe kiel spirita, ĉar spirito estas pli forta ol la materio."

## Bona traduko

La bulgara inĝenierino **Margarita Savova**, prezidanto de Esperanta Asocio "Libero", siavice tiel sin esprimis en la unuaj alineoj de sia analizo pri la furora libro: *"Dank' al bona traduko en internacian lingvon Esperanto kaj al portalo BonaVolo.com en retejo, mi havis la plezuron ekkoni faman grandan brazilan verkiston — José de Paiva Netto. Li estas ĵurnalisto, poeto, radipreleganto, komponisto, erudiciulo, packreinto, humanisto kaj Direktoro-Prezidanto de la Legio de Bona Volo kaj fondinto de la Templo de Bona Volo, unu el Sep Mirindaĵoj en Braziljo, la ĉefurbo de Brazilo, ankaŭ de la Monda Parlamento de la Ekumena Frateco".*

Laŭ Margarita, ĉiu eldiro kaj/aŭ citaĵo de historiaj eminentuloj, akompanataj de biografia informo farita de la aŭtoro, havigas al la beletra verko ian enciklopedian dimension. Ne senkiale ŝi titolis sian recenzon kiel "Enciklopedio pri Spiritualeco". *"La aŭtoro uzas grandskalajn kaj multtavolajn pensojn. Por kompreni liajn riĉajn analizojn ni devas enpenetri al la profundon de liaj epistoloj. La homo kiel kreita de Dio en si havas potencialon krei — la preĝo helpas al tio. [...] Laŭ mi Paiva Netto laboras en la altaj niveloj de la spiritualeco, pri Tuta Ekumenismo, trans Senliman Ekumenismon* (tezoj de la aŭtoro), *ĉar ĝi proponas unuiĝon de ĉi tiu mondo kun la Alia. Li instruas nin kia maniere alteniĝi la homaro"*, ŝi analizas.

Ŝi substrekas ankaŭ ke la aŭtoro *"trarigardas plej delikatan parton de la homo — la animo".* Kaj kompletigas: *"Paiva Netto estas granda spirita instruisto de la homaro. Tio signifas, ke li vidas pli longe kaj pli profunde de siaj nuntempuloj. [...] La aŭtoro ektuŝas delikate dian peceton en la koro de la homo. Li rigardas la homon ne nur kiel materia estaĵo, sed precipe kiel spirita, ĉar spirito estas pli forta ol la materio. Paiva Netto predikas oni uzi kristanajn postulatojn — fratan amon, solidarecon, pacon, justecon, paciencon, saĝecon, karitaton, toleremon, ne nur en religio, sed en ekonomio, politiko, filozofio kaj scienco. Li instruas, ke 'la Vizaĝo de Dio estas Amo' kaj 'Diaj Leĝoj regas la destinojn sur la Tero'. Dio ĉeestas inter la homoj nur tiam, kiam iliaj pensoj, sentoj kaj reprezentoj estas penetritaj de frata amo".*

## "Spirita instruo"

Per tiuj vortoj resumis la titolon de sia beletra recenzo la rumano, la gimnazia instruisto **Mihai Trifoi**, prezidanto de Rumana Esperanto-Asocio, estro de la rumana sekcio de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kaj prezidanto de la Porinfana Fondaĵo "ESPERANTO-RO".

Li skribas pri la instruoj lernitaj dum legado de *Meditadoj el la Animo*, kaj substrekas kelkajn elprenaĵojn:

*"La aŭtoro ofte parolas pri la neceso de Frata Amo, do pri kompato, solidareco kaj karitato, pri altruismo. Kiam la homo suferas, li devas senti tiun humanan apogon por rezisti:* 'Se homo sentas, ke li estas humane apogata, tiam li kreas iaspecan tre fortan internan reziston, kiu helpas lin resaniĝi aŭ pacience elteni doloron' *(paĝo 85). La homo devas bone regi la proprajn sentojn kaj pensojn por ke siaj faroj estu bonaj por la homaro:* 'Antaŭ ol eksplodi en la mondo, milito kreskas en la homoj…' *(paĝo 93). Sed la homa konduto devas esti ekzemplodona, kaj pro tio oni devas respekti la instruon de Jesuo:* 'Sekvi Jesuon postulas pli ol elvolviĝintan intelekton: ĝi postulas koron senteman, tamen liberaman, tiamaniere kuraĝan, ke ĝi povu laŭte diri, ke trans la necertaj asertoj de la mondo, ŝvebas ia Aŭtoritato pli solida ol tiu de armiloj, ĉar ĝi milde parolas al Animoj kaj estas de ili komprenata' *(paĝoj 103-104)."*

La instruisto atentigas pri aliaj aspektoj: *"Kiel realiĝas la spirita instruo en la opinio de Paiva Netto? Li ne nur teorie parolas pri tio, sed ankaŭ agadas praktike. Li opinias, ke* 'La Tero estas ia Dia Edukejo, kie disvastiĝas la noblaj instruoj de Jesuo, la Ĉiela Profesoro'*, kaj li donas multajn ekzemplojn pri la lumaj figuroj de la Renesanco:* ***Da Vinci****,* ***Mikelanĝelo****,* ***Cellini****,* ***Rafaelo****,* ***Giovanni Picco della Miradola****,* ***Pietro Pomponazzi****. Kaj lige de la homa kaj spirita evoluo la aŭtoro substrekas la ideon de reenkarniĝo:* 'Same okazas koncerne la Universalan Leĝon de Reenkarniĝo, per niaj alvenoj al la Tero, kaj revenoj al la Ĉielo…ĝis ni meritos resti tie supre'*"*.

Rilate la biografiajn aspektojn de la aŭtoro de *Meditadoj el la Animo*, komentas la instruisto Mihai, *"La edukanto Paiva Netto ne nur teorias pri la valoraj spiritaj instruoj de Jesuo, sed li profunde praktikas tion"*. Kaj li konkludas: *"Luma kaj moderna pedagogo Paiva Netto donas novan orientiĝon al la instrumetodoj de nia tempo. Multaj kulturaj homoj kaj naciaj kaj internaciaj organizoj rekonas kaj aprobas tian agadon. Fakte temas pri vera spirita kontribuo por pli rapida transformiĝo de la homa konscio per edukado por amo al proksimulo, solidareco kaj respekto por ĉiuj bonaj valoroj, respekto por vivo"*.

Laste, s-ro Mihai asertas: *"Ni povas diri, ke per ĉiuj verkoj kaj faroj, José de Paiva Netto, aŭtoro de la verko 'Meditadoj el la Animo' kaj de multaj aliaj kreaĵoj, fariĝas unu el la Instruistoj de nia moderna sed ankoraŭ malsufiĉe evoluinta mondo, Instruisto kiun oni meritas sekvi por plialtigi la konscion de la homaro"*. ●



Persona arkivo

Instruisto Mihai Trifoi, prezidanto de Rumana Esperanto-Asocio, estro de la rumana sekcio de ILEI kaj prezidanto de la Porinfana Fondaĵo "ESPERANTO-RO".

> "Luma kaj moderna pedagogo Paiva Netto donas novan orientiĝon al la instrumetodoj de nia tempo."

## PORTALO BONA VOLO

Aliru al www.bonavolo.com kaj legu aliajn opiniojn de esperantistoj pri la verko. Tie Vi ankaŭ trovos informojn pri kiel aĉeti ĝin.

# Internaciaj komunikiloj kunhavigas mesaĝojn por Vivo

La Departemento pri Esperanto de Legio de Bona Volo ĉiam kalkulas je la valora kunhelpo de esperantistoj, simpatiantaj al la laboro kaj frata mesaĝo de tiu Institucio pere de la internacia lingvo, kiuj reproduktas la artikolojn pri valorigo de la Vivo de aŭtoreco de la verkisto, radikomunikanto kaj ĵurnalisto Paiva Netto en siaj enlandaj komunikiloj. Ekde sia origino LBV diskonigas la celojn de Esperanto, kiuj multe identiĝas kun tiuj de la Instituсio — tiuj pri Paco kaj kunfratiĝo de la popoloj el ĉiuj nacioj. Vidu kelkajn diskonigojn:

## HUNGARIO

**Diskoniganto:** Adrienne Pásztor
**Nomo:** Nordhungaria Informo
**Diskonigilo:** Revuo
La revuo *Nordhungaria Informo* aperigis la artikolon "Monda Tago de Akvo", laŭ iniciato de s-ino Adrienne Pásztor, el Miskolk.

## BRAZILO

**Diskonigantoj:** Fernando Maia kaj Wilson Oliveira
**Nomo:** Brazila Esperanto-Ligo (BEL)
**Diskonigilo:** Interreto
La reta dulingva bulteno de BEL aperigis la artikolon de la verkisto Paiva Netto "Ekumenismo de koroj kaj Esperanto".

Por legi tiujn kaj aliajn artikolojn de la verkisto Paiva Netto, vizitu la retejon www.paivanetto.com, kie vi povas ankaŭ koni la biografion de la aŭtoro kaj sendi komenton post legado de ĉiu artikolo. Legio de Bona Volo dankas la apogon de la geamikoj el la tutmonda esperantista movado je diskonigado de la frataj kaj ekumenaj idealoj de la Institucio. Estu ankaŭ vi multobliganto de tiu mesaĝo!



## ALBANIO

**Diskoniganto:** Bardhyl Selimi
**Nomo:** Albana Esperanto-Instituto
**Diskonigilo:** Bulteno

La artikolo "Tabakfumado inter lernejojunuloj" diskonigis ankaŭ la bulteno de la Albana Esperanto-Instituto. La iniciatinto estis s-ro Bardhyl Selimi, kiu ĝin aperigis pere de la junia eldono de tiu periodaĵo, kun aldona reliefigo al tiu eldiro de la verkisto: *"Amo estas plej granda ĉampiono ĉe plej malfacilaj bataloj. Ĝi superas ĉiajn suferojn. Ĝi estas Dio"*. Krome, la bulteno aperigis, en la aŭgusta numero, la artikolojn "Amikeco, jen mia Religio" kaj "Al la Junularo".

## AŬSTRALIO

**Diskoniganto:** Katarina Taggart
**Nomo:** Tamen Plu
**Diskonigilo:** Bulteno

La oficiala organo de Sudaŭstralia Esperanto diskonigis al siaj legantoj la tekstojn de la ĉefgvidanto de LBV: "Al la Junularo" kaj "Fumkokaino kaj virinoj".

## RUMANIO

**Diskoniganto:** Jolanda Józsi
**Nomo:** Netlog
**Diskonigilo:** Interreto

La artikolon "Amikeco, jen mia Religio" oni kunhavigis ankaŭ en la interreto. S-ino Jolanda Józsi, en Rumanio, diskonigis la materialon en sia persona blogo.

## AŬSTRALIO

**Diskoniganto:** Franciska Toubale
**Nomo:** Melbourne Ethnic Community Radio
**Diskonigilo:** Radio

Dum elsendo de la Melburna Radio 3ZZZ, la esperantistino Franciska Toubale legis la artikolon "Tabakfumado inter lernejojunuloj".

# ESPERANTO, KIAL NE?


## Disvastigado kaj instruado de la Lingvo

Temo de la 49a Brazila Kongreso de Esperanto
(Florianópolis, Januaro/2014)

Jair Salles

Kiel oni scias, la angla lingvo, nuntempe, estas vaste uzata en la tuta mondo kiel *lingua franca* (latine: lingvo libera), en ĉiuj kampoj de la homa aktivado. Pro tio, eble, multaj personoj emas imagi ke oni ne plu devus zorgi pri Esperanto. Ili opinias ke la angla lingvo jam solvis la mondan lingvo-problemon. Sed ni, esperantistoj, scias ke la solvo proponita de Esperanto estas multe pli taŭga ol tiu de la

Vivian R. Ferreira



**Jair Salles**, veterana instruisto de Esperanto de Rio-de-Ĵanejro/RJ, Brazilo. Aŭtoro de pluraj lernolibroj de Esperanto (˝Miksa-Dinamika Metodo˝).

angla, aŭ de iu ajn nacia lingvo.

Kiel oni scias, la latina lingvo estis la *kultur-lingvo* de la universitatoj de Eŭropo dum la Mezepoko. Poste, venis la glora regado de la franca lingvo, ĉefe en la 19-a jarcento. Kaj, nuntempe, kiel ni jam diris supre, regas la angla lingvo, ĉefe post kiam Usono gvidis la venkon en la 2-a Mond-Milito. Ŝajnas ke la angla kvazaŭ sorĉis la psikon de la homoj, en ĉiuj kontinentoj, pere de la magio de la kin-industrio de Usono.

Tamen, feliĉe, eĉ en Usono mem ekzistas sufiĉe bona Esperanto-Movado, ĉar estas sufiĉe da usonaj esperantistoj, kiuj rekonas ke la angla ne estas la vera solvo por la monda lingvo-problemo. Mi mem, ekzemple, delonge, rekte aŭ malrekte, okupiĝas pri la kono de la angla. Mi jam parolis ĝin, sufiĉe flue, kun pluraj alilandanoj. Tamen mi konfesas ke, kiam mi spektas usonan filmon, en la angla, mi ankoraŭ bezonas la helpon de la t.n. subtitoloj, t.e., la surekrana traduko. Sen tiu traduko, mi povus kompreni la esencon de la filmo (kiel mi faras kelkfoje per Interreto). Sed por vere kompreni ĉiujn subtilaĵojn de la enhavo de la filmo, la traduko estas necesa. Tamen, se temus pri filmo parolata (aŭ dublita) en Esperanto, mi ne bezonus la tradukon — escepte se la koncerna filmo estis farita pere de ne-bonaj konantoj de nia lingvo. Pro tio, se iu demandos al ni "Kial okupiĝi pri Esperanto?", mi sugestas respondi per alia provoka demando: "Kial ne?!".

## Disvastigado

Eble la disvastigado (aŭ informado) pri Esperanto estas la ĉefa tasko de nia Movado. Ĉar estas evidente ke, se la personoj ne scios pri la ekzisto de la lingvo, ili ne povos interesiĝi pri ĝi. Kiel dirus Evandro Cabloco (eble, nuntempe, la ĉefa propagandisto de Esperanto en Rio): "Se ni ne diros al la homoj ke Esperanto ekzistas, ĝi povos vere ne plu ekzisti". Kaj, feliĉe, nuntempe, la Esperanto-Movado povas kalkuli pri la helpo de gravega aliancano: la Interreto. Tiu mondvasta Reto estis kreita pere de la fortega angla lingvo, tamen tio tute ne malhelpas ĝian uzon favore al la disvastigado kaj eĉ al la instruado de Esperanto. Kiel ni scias, ekzistas multaj videoj en Esperanto pri sennombraj temoj, krom radio- kaj tv-stacioj virtualaj. Fakte, esperantistoj povas senti sin hejme en la monda Reto kaj pluraj profitas por eĉ transkontinente babili per sistemoj de interreta



"Ni uzu ĉiujn eblajn rimedojn por diskonigi Esperanton, kiel tradiciajn prospektojn kaj allogajn afiŝojn, sed ĉiam kun subteno de la tutmonda Interreto."

telefono, kiuj permesas la rektan interparolon kun sono kaj vidkamerao. Konklude: ni uzu ĉiujn eblajn rimedojn por diskonigi Esperanton, kiel tradiciajn prospektojn kaj allogajn afiŝojn, sed ĉiam kun subteno de la tutmonda Interreto.

## Instruado

Ni diris, supre, ke la disvastigado estas, eble, la ĉefa tasko de la Esperanto-Movado. Sed tuj post la disvastigado, venas la vico de la instruado. Fakte la instruado estas tre grava, ĉar imagu, ekzemple, ke iu homo legas iun prospekton aŭ afiŝon aŭ vidas iun informon en Interreto pri Esperanto. Poste, tiu homo interesiĝas pri Esperanto kaj, kompreneble, provas ĝin lerni. Sed imagu ke por tiu studo li trovas lernolibron tre malnov-




stilan, tro “gramatikecan”. Probable li ne entuziasmiĝos pri lernado de la internacia lingvo. Cetere, en nia informado pri Esperanto, ni ne devas troigi pri ĝia facileco. Sed ankaŭ ne estus juste ne diri ke ĝi estas facila. Kion fari? Estas simple: sufiĉas emfazi ke Esperanto estas facila en komparo kun la naciaj lingvoj. Okazas ke, eĉ se multe pli simpla, kaj do pli facila ol la ordinaraj lingvoj, Esperanto, tamen, ne estas iu “ludila lingvo”. Kontraŭe, Esperanto estas tiel riĉa kiel la grandaj naciaj lingvoj, kaj fakte eĉ pli esprimiva en pluraj aspektoj. Pro tio, ĝia serioza studo estas relativa defio kaj ankaŭ ekzistas kelkaj ne tiel facilaj punktoj, pri kiuj ni parolos en la sekva parto de ĉi tiu modesta artikolo.

## La ĉefaj gramatikaj “malfaciloj”

Kiel dirite supre, seriozaj esperantistoj rekonas ke ekzistas kelkaj gramatikaj punktoj en Esperanto, kiuj estas iom tiklaj (aŭ pli delikataj). En nia longa sperto pri la instruado, ni konstatis ke, ĝenerale, la plejmulto el la lernantoj trovas, en Esperanto, la jenajn ĉefajn 7 “malfacilojn”: (1) akuzativo; (2) korelativoj; (3) prepozicioj; (4) participoj; (5) la refleksivo *sia*; (6) la sufiksoj *ig/iĝ*; kaj (7) la aglutineco, tipa de Esperanto. Sed, post pluraj jaroj da esplorado en pluraj lernolibroj (brazilaj kaj alilandaj, kiel la interesa metodo *Linguaphone*, el Anglio, el la 30-aj jaroj), ni sukcesis ellabori la respektivajn didaktikajn artifikojn, per kiuj ni provis kiel eble plej multe faciligi la komprenon de tiuj (ŝajne aŭ vere) pli malfacilaj 7 gramatikaj punktoj de la lingvo. Tiuj didaktikaj artifikoj (ankaŭ nomataj en la portugala kiel *macetes*) aperas, en maniero pli formala, en la *Gramatika Suplemento* de la tria lernolibro de nia serio, t.e., *La Konversacia Klubo* (Perfektiga Kurso). Tamen, se iu interesiĝos pri la titoloj de la aliaj libroj de nia t.n. *Miksa-Dinamika Metodo*, jen la kompleta listo: (1) *Minicurso de Esperanto* (Enkonduka Kurso. Ankaŭ kun versio en la hispana); (2) *Esperanto Conversacional* (Baza Kurso); (3) *La Konversacia Klubo* (Perfektiga Kurso); Ekstra: *La Reveno* (Progresiga Legolibro). Por pliaj informoj: <www.kke.org.br>.

## Konkludo

Kiel ni diris en la komenco, multaj kredas ke la angla lingvo jam solvis la mondan lingvoproblemon, sed ni, esperantistoj, scias ke Esperanto estus solvo multe pli justa kaj facila. Do se iu demandos al ni “Kial okupiĝi pri Esperanto?”, ni ja povos respondi per alia provoka demando: “Kial ne?!”. Tamen, por ke nia agado estu kiel eble plej sukcesa, ni devos zorgi pri disvastigado kiel eble plej efika. Kaj la instruado devos esti kiel eble plej faciligita.




João Periotto

# PEDAGOGIO por Paco

La kapablo de lernejoj formi agantojn por daŭripova elvolviĝo

**Suelí Periotto**


Vivian R. Ferreira

**Suelí Periotto** estas superrigardantino de Pedagogio de Bona Volo (kiu konsistas el Pedagogio de Amo kaj Pedagogio de Ekumena Civitano), kaj direktoro de Instituto pri Edukado José de Paiva Netto, en San-Paŭlo, Brazilo. Ŝi estas magistro pri Edukado, de PUC-SP, preleganto kaj prezentanto de la programo *Edukado en Debato*, per Superreto Bona Volo de Radio.

*Por ekkoni pli pri la pedagogia gvidlinio de Legio de Bona Volo, por kiu pledas edukanto Paiva Netto, la legantoj elŝutu* QR Code *en sian plurfunkcian telefonon, fotu la kodon kaj havu la* Manlibron pri Pedagogio de Amo kaj pri Pedagogio de Ekumena Civitano, *de LBV, disponebla en la lingvoj hispana, franca, angla kaj portugala.*

La pasinta jarcento montris, ke teknikaj novaĵoj per si mem ne sufiĉas por atingi daŭripovecon. Necesas pli profunda reekzameno de modeloj kaj valoroj, kiuj povas transformi la tutmondan socion. Produktado kaj disvastigado de soci-mediaj teknikologiaĵoj devas inkluzivi valorigon de scioj, kiuj akumuliĝis dum miloj da jaroj ĉe diversaj kulturoj, ne nur sciencan scion.

Konstantaj instigoj fare de multobliga kulturo, per daŭripovaj agoj ĉe lernejoj, povas stimuli preparadon de ĉefroluloj en ia nova monda scenejo, en kiu la vojoj al medikonservado aliĝos al forta konscio pri daŭripoveco. Kun novaj agantoj en tiaj ŝanĝomomentoj, novaj ideoj influos aliajn al trairado de tiu sama pado al homeca progreso.

Legio de Bona Volo kundividas sian sperton pri Kulturo de Paco ĉe komunumoj, kie ĝi agadas, en Brazilo kaj eksterlande. En siaj lernejoj, Komunumaj Centroj por Socia Asistado kaj hejmoj por maljunuloj, tiu Institucio elvolvas sociedukajn agadojn, kiuj rekte interŝanĝas spertojn kun la teknologiaj bezonoj kaj kun la kultura kadro de asistataj homoj.

Ĝi atentas pri la lokaj realaĵoj, valorigas kulturajn radikojn de ĉiu unuopa komunumo, faciligas al ĝi aliron al informadika mondo kaj al novaj rimedoj, kaj krome stimulas ampleksan pripensadon, ĉar ĝi aldonas al sia agado valorojn de civitaneco, etiko kaj ekumena spiriteco*. Por konstanta kunlaborado kun LBV, oni invitas al integriĝo al projektoj de tiu institucio edukistojn el la publika kaj privata instruretoj, ĉu por prelegoj, ĉu por pedagogiaj atelieroj, kaj ankaŭ al kongreso pri edukado, kiun oni okazigas ĉiujare.

## Intelekto kaj sentoj

La Institucio okupiĝas pri la intelekta formiĝado kaj pri la elvolviĝado de socia-emocia, etika kaj intuicia potencialo de la edukatoj, kaj konigas ilin pri novaj teknologiaĵoj, kiuj faciligas al ili la mondon de laboro kaj plifortigas iliajn eblecoj por plua studado. Por tio, ĝi aplikas propran edukvojon, formitan per Pedagogio de Amo kaj per Pedagogio de Ekumena Civitano, kreita de la ĉefgvidanto de la Institucio, edukanto José de Paiva Netto. Laŭ ĝi, la celo estas kunigi inteligentecon de la cerbo al tiu de la koro, tiel ke la kapabloj kaj kompetentecoj elvolvitaj de la lernantoj estu miksataj kun etikaj, ekumenaj kaj spiritaj

***Ekumena Spiriteco —** Tiu standardo de Legio de Bona Volo ĉeestas en ĉiuj ĝiaj sociedukaj agadoj, ĉar ĝi estas komprenata kiel *"lulilo de plej karaj valoroj naskiĝintaj el la Animo, la nesto de emocioj kaj de la racio prilumita de intuicio, la medio kiu envolvas ĉion kio transcendas la vulgarecon de materio kaj originas el la sublimigita homa sentemo, kiel Vero, Kompatemo, Moralo, Etiko, Honesteco, Frata Amo. Entute, la konstanta matematiko, kiu harmoniigas la ekvacion de la spirita, morala, mensa, homa ekzistado"*. Elprenaĵo de la libro *Urĝas Reeduki!*, kiu fundamentas la edukan gvidlinion de LBV, verkitan de la edukanto Paiva Netto, aŭtoro de pluraj furoraj titoloj, kun pli ol 5 milionoj da venditaj ekzempleroj.

Fotoj: Vivian R. Ferreira




Per sia kulturo por multobligaj agoj celaj al daŭripoveco en lernejo, LBV preparas protagonistojn por iu pli inkluziviga monda scenaro. Ekster lecionperiodo, la lernantoj de Instituto pri Edukado José de Paiva Netto, en San-Paŭlo (Brazilo) partoprenas (1) lecionojn en la Informadika Laboratorio, (2) lernas la Brazilan Lingvon de Signaloj (Libras) kaj plenumas praktikajn agadojn (3) en la Laboratorio de Sciencoj.







valoroj. Sekve, ĝi garantias bonkvalitan instruadon kaj favoras travivadon de ia ekumena civitaneco, surbaze de sentoj de solidareco, paco kaj respekto pri malsamecoj.

Akceptante infanojn kaj adoleskantojn en situacio de risko, ĉu en sian reton de lernejoj, ĉu en sociedukajn programojn, kiujn ĝi havas en pli ol 70 brazilaj urboj, LBV zorgas, ke

"LBV opinias, ke la tutmonda socio povu profiti de solidara uzado de novaj teknologiaĵoj — aparte tiuj por informado kaj komunikado (nome, la bazo de informadika ekonomio), kaj ankaŭ de socimediaj teknologiaĵoj, kiuj meritas okupi elstaran pozicion en la programo de investoj de registaroj kaj de la privata sektoro."

oni proponu al ili eblecon aliri al komputilo kaj al ĝiaj bazaj rimedoj. La propono pri tuteca edukado — kiu inkluzivas valorojn de Solidara, Altruisma, Ekumena Socio — taŭgas kiel fundamento por ke la edukatoj sekvu akademiecan karieron. Tiel ankaŭ li kontribuos por la konstruado de kulturo, kiu favoras daŭripovecon kaj socian justecon, kun konscio pri uzado de tiuj novaj teknologiaĵoj.

La inklino al formado de agantoj por daŭripova elvolviĝado akiras specialan amplekson ĉe la amaskomunikiloj de LBV. Kun pedagogiaj konceptoj, Legio de Bona Volo produktas kaj/aŭ apogas edukajn materialojn por radio, televido, interreto kaj publikaĵoj. Tiun materialon produktas grandparte ekslernantoj de la Institucio, kio estas rezulto de konstanta programo por formado de profesiuloj en kampoj de aŭdvidaj rimedoj kaj multkomunika produktado, kaj krome projektoj progresas por muntado de teknika lernejo por socia komunikado. Tiu tuta agado kongruas kun ĉiuj edukaj kaj sociasistaj celoj de la Institucio, ĉar akceptitaj infanoj, gejunuloj kaj plenaĝuloj estas stimulataj fariĝi multobligantaj agantoj por daŭripoveco, tiel ke ĉi tiu propono ĉiam atingas novajn kampojn, kiam la koncerna komunumo mem kreas kondiĉojn por dialogo kaj plifortigas sian partoprenadon serĉe de solvoj por lokaj problemoj.

## Strategioj por informadika inkluzivado

En formala instruado, la Institucio atentas pri uzado de teknologiaj rimedoj kaj klopodas aktualiĝadi, ĉiam valorigante vojojn, kiuj kontentigas individuajn bezonojn de la edukatoj, precipe koncerne specialajn edukajn situaciojn, diagnozojn pri psikologiaj kaj movkapablaj misfunkcioj, ofte kaŭzataj de problemoj ĉe la movkapablo de la lernantoj. Multdisciplinaj laborfakuloj de LBV uzas faciligajn strategiojn por lernado, laŭ la raportoj de psikologoj, psikiatroj, parol-aŭd-fakuloj kaj edukistoj.

Rezultas de tiu laboro propono pri altkvalita edukado, en bonveniga etoso, kiu kunigas valorojn de ekumena civitaneco al pedagogiaj agoj, de plej frua aĝo. Tia speciala tutaĵo favoras solidan sociemocian elvolviĝon de la infanoj, kaj tio estas fundamento por tuteca formiĝado de la individuoj, laŭ la kriterioj de la edukaj principoj, kiujn oni aplikas en la lernejoj de tiu Institucio.

LBV opinias, ke la tutmonda socio povu profiti de solidara uzado de novaj teknologiaĵoj — aparte tiuj por informado kaj komunikado (nome, la bazo de informadika ekonomio), kaj ankaŭ de socimediaj teknologiaĵoj, kiuj meritas okupi elstaran pozicion en la programo de investoj de registaroj kaj de la privata sektoro. Legio de Bona Volo substrekas ankaŭ, ke necesas intensigi tutmondan diskutadon pri la scienca agado kaj ĝia etiko, por ke progresoj en esplorado ne obeu strikte ekonomian, ekskludantan tendencon, kiu nepre pligravigas malegalecojn.

Pri tio, atentigas la edukanto Paiva Netto: *"La tre dezirata struktura ŝanĝo devas kalkuli, krom pri la potenco de Racio, ankaŭ pri plej bona Homa Sento; male, ĝi plu esprimados la troreveman tendencon en kiun ĝi ofte preskaŭ transformiĝis. Urĝas do kunigi menson kaj koron. Oni rigardu la alton, sed konvenas, ke la piedoj firme staru surgrunde".*




**Plenumu vian parton!**

## Sciu kie troviĝas LBV

**CENTRA SIDEJO:** Rua Sérgio Tomás, 740 • Bom Retiro • São Paulo/SP • Brazilo • CEP 01131-010 • Tel.: (+5511) 3225-4500 • www.lbv.org • www.bonavolo.com • **LBV DE ARGENTINO:** Av. Boedo, 1.942 • C1239AAW • Buenos Aires • Tel.: (+5411) 4909-5600 • www.lbv.org.ar • **LBV DE BOLIVIO:** Calle Asunta Bozo, 520 • Zona Alto Obrajes (sector A) • La Paz • Casilla de Correo, 5951 • Tel.: (+5912) 273-3759 • www.lbv.org.bo • **LBV DE USONO:** 36 W 44th Street • Mezzanine • Manhattan • New York • 10036 • Tel.: (+1646) 398-7128 • www.legionofgoodwill.org • **LBV DE PARAGVAJO:** Calle Curupayty, 1452 • Barrio Villa Cerro Corá • Ciudad de Lambaré • Tel.: (+59521) 921-100/3 • www.lbv.org.py • **LBV DE PORTUGALIO:** Comandante Rodolfo de Araújo, 104 • Bonfim • Porto • CP 4000-414 • Tel.: (+35122) 208-6494 • www.lbv.pt • **LBV DE URUGVAJO:** Av. Agraciada 2328 • Aguada • Montevideo • CP 11800 • Tel.: (+5982) 924-2790 • www.lbv.org.uy

PACO SUR LA TERO AL LA HOMOJ DE BONA VOLO
LBV

**Helpu! www.legionofgoodwill.org**

Banko Santander: Bankokodo: 0239 • Kontnumero: 13002754-6

Banko HSBC: Bankokodo: 0343 • Kontnumero: 63275-24

# VERDAJ NOVAĴOJ

## Esperanto en la Festivalo Asoj de Paco

Esperanto elektiĝis kiel la oficiala internacia lingvo de la Festivalo Asoj de Paco, kiu okazis en Gojanjo (Brazilo) inter la tagoj 18a kaj 21a de septembro 2013. Temas pri evento kun agadoj ellaboritaj de la Instituto Soldatoj de Paco partnere kun Komitato el diversaj institucioj celantaj la starigon de Packulturo. Tiu eldono de la Festivalo konsistas el laborplano koncernanta kvar agadkampojn, nome preventadon, kontraŭstaradon kaj kuracadon rilate al droga dependeco; metilernadon kaj entreprenismon por gejunuloj. Dum la Festivalo oni gvidis intensan kurson de Esperanto. Ankaŭ la kampanjo "Eu escolho paz" esperantiĝis al "Mi elektas pacon" kaj la muziko "Pazeando" fariĝis "Pacume". La evento estas malfermita al ĉiuj. Por pliaj informoj, vizitu la dulingvan retejon <www.festivalcraquesdapaz.org>.

## Kolekto de esperanta radio en la interreto

Pli ol 500 esperantaj elsendaĵoj de la iama Svisa Radio Internacia povas esti senpage aŭskultataj en la interreto. La sonregistroj estis konservitaj kaj publikigitaj de la parolistoj Claude Gacond kaj Artur Baur.

La kolekto konservita en la Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia de la Biblioteko de Ĉaŭdefono, konsistas el sondosieroj produktitaj en la jaroj de 1977 ĝis 1991. Tie troviĝas novaĵoj, intervjuoj kaj prelegoj de famaj nomoj de la historio de Esperanto. La materialo povas esti aŭskultata ĉe la retadreso www.cdeli.org/Sonarkivoj.

## Instruu Esperanton al infanoj de la mondo

Peto-skribo disponeblas en la interreto al ĉiuj interesiĝantoj subskribi favore al la diskonigado de la lingvo internacia. Tiu petskribo celas faciligi la procedojn, kiuj ebligas la starigon de internacia kompreno, kunlaboro kaj amikeco pere de la instruado de Esperanto al infanoj en la elementa lernejo. La lecionoj estus gvidataj de regulaj instruistoj kadre de la kursaro de la koncerna edukejo. Per tiu propono oni celas atingi pacon, atentigante al la bonfaroj de la lingvo Esperanto kiel tiu ebliga ponto.

# Universala Kongreso de Esperanto

De la 20-a ĝis la 27 de julio 2013, la esperanto-movado enfokusigis la 98-an Universalan Kongreson de Esperanto. La temo estis "Insuloj sen izoliĝo: por justa komunikado inter lingvo-komunumoj" kaj la evento kunvenigis en Rejkjaviko (Islando) 1034 partoprenantojn venintaj el 55 landoj de ĉiuj mondopartoj. La UK estas la plej granda jara manifestacio de la Esperanto-movado, kiu havigas kulturfestivalon, tutmovadan forumon kaj turisman feston.

Ĉeestis la malferman solenaĵon kvar membroj de la Honora Komitato de UK. Inter la diversaj salutparoladetoj estis tiu de TEJO, ankaŭ de ILEI; de la Akademio de Esperanto. Tradicie ankaŭ dum la 98-a UK estis adoptita kongresa rezolucio.

## 95-jara esperantisto eldonas lernolibron de Esperanto

La brazila esperantisto José Saraiva Matos verkis kaj publikigis la libron *Praktika Kurso de Esperanto*. Temas pri elementa metodo, kiu celas instrui la internacian lingvon helpe de la portugala.

La libro enhavas 172 paĝojn, 48 lecionojn, 40 ekzercojn, vortareton, krucvortojn, koncizan gramatikon, poeziaĵojn kaj elprenaĵojn el famaj verkoj. Krome ĝi prezentas bazajn informojn pri la Esperanto-movado enlande kaj eksterlande.

José Saraiva Matos, kies plumnomo estas Jozefo Hajlo, estas 95-jara. Li loĝas en Salvador, ĉefurbo de ŝtato Bahia, nordorienta regiono de Brazilo. Li naskiĝis je la 10-a de julio 1918, en Guaraciaba do Norte (ŝtato Ceará). Post lia emeritiĝo, li fariĝis esperantisto. Nuntempe li estas ano de UEA, BEL kaj Bahia Esperanto-Asocio.



shutterstock.com

# Respekto al komenciĝanta VIVO

## Fakulo pri molekulbiologio atentigas pri la manko de informoj pri la seriozaj konsekvencoj de abortigo

**Angélica Beck** kaj **Leila Marco**

En intervjuo al revuo BOA VONTADE [BONA VOLO], eldono 234, doktorino pri Molekulbiologio de Federacia Universitato de San-Paŭlo (Unifesp) **Lilian Piñero Eça**, prezidanto de Instituto por Esplorado pri Stamĉeloj (IPCTRON), klarigas detalojn rilatajn al la komenco de la vivo en homa reproduktiĝo kaj la gravajn konsekvencojn de abortigo por korpa kaj mensa sano de virinoj.

D-rino Lilian estas ankaŭ direktorino pri scienco ĉe Centro de Aktualigoj pri Sano (CAS), en la urbo San-Paŭlo, kaj ŝi atentigas pri la danĝero, ke oni laŭleĝigu la projekton por rajtigo je aborto en Brazilo. Por tio, ŝi baziĝas sur longa spertado kune kun aliaj profesiuloj, aparte en la laboro de plurdisciplina skipo de CAS, por prizorgi virinojn, kiuj interrompas gravedecon.

Tiu fakulino defendas la rajtojn je civitaneco de post fekundiĝo, nome momento, kiam komenciĝas individua vivo. Anstataŭ pensi pri mortigo, tiu esploristino rekomendas, ke prefere necesas plibonigi la vivkvaliton de brazilanoj.

La opinio de tiu biologimedicinisto aldoniĝas al ampleksa diskutado, kiu fokusas zorgemon pri la vivo — laŭ Legio de Bona Volo tiu afero inkluzivas la dimensiojn materian, moralan kaj spiritan, ĉar Vivo ekzistas antaŭ la koncipo. Laŭ diraĵo de la direktoro-prezidanto de LBV,

José de Paiva Netto: *"Dum momento ni estas en korpo, sed por ĉiam ni estas Spiritoj"*.

**BOA VONTADE — Ni dankas vin por via bonvolemo akcepti LBV-on por paroli pri la konsekvencoj de abortigo je virina sano.**

**D-rino Lilian Eça** — Kun plezuro mi staras denove ĉe Legio de Bona Volo. Mi ricevas tian inviton ĉiam kun emocio. Mi aliĝis al tiu tuta mirinda energio de LBV. Mi esperas per simpla maniero klarigi la dubojn de virinoj kaj ankaŭ de viroj, ĉar neniu gravediĝas sola. Eblas klopodi eviti gravedecon laŭ la menstruaj cikloj, sed post enplantiĝo de gravedeco oni devas konservi ĝin, por la sano de tiu virino.

**BV — Dum gravedeco, la virina korpo ŝanĝiĝas...**

**D-rino Lilian Eça** — La komenco de homa vivo estas la renkontiĝo de spermatozoo kun ovolo. Tie formiĝas embriaj stamĉeloj, kiuj estigas homon. Tie troviĝas ĉiuj proteinoj kaj indikoj por la estonta cerbo, la kruretoj, la braketoj. (...) Mi esploras signalojn de ĉeloj de embrioj en la utero. Ni, virinoj, havas du hormonojn, pri kiuj multe parolas ginekologoj: oestrogeno kaj progesterono. La unua ekzistas en la korpo preskaŭ la tutan tempon. La molekuloj de proteino de oestrogeno influas nian tutan korpon; pro tio virinoj ne havas iujn harojn, havas pli fortan emociemon kaj la neston por patriniĝo. Tuj post fekundiĝo kaj gravediĝo, oni komencas sekrecii progesteronon, kaj ĝi komencas anstataŭi oestrogenon. Post 48 horoj de la komenco de gravedeco, jam ĉeestas ĉiuj transformiĝoj en trilionoj da ĉeloj, kiuj formas virinon, kaj unu el tiuj ŝanĝoj estas emociemo, kaj oni eksentas pli da dormemo, ankaŭ... Kial oni sentas pli da dormemo? Por malpliigi foruzadon de energio. Ĝi estas tempo, por konservi energion por la bebo. Do la virino estas plene prepariĝinta por la infano. Sed tiam ŝi decidas ke, sola aŭ kun la partnero, ŝi ne deziras tiun gravedecon. Sed, tiu tuta virino ricevas signalojn fare de progesterono, ĉe la trilionoj da ĉeloj, ĉe sinapsoj... Ŝi havas ĉiajn signalojn por formi tiun tute apartan homan estaĵon.

**BV — Ĉu abortigo povas kaŭzi malekvilibron en la korpon?**

**D-rino Lilian Eça** — Kiam oni decidas forigi la idon, oni faras mallumon... kiel depreni elektran konektilon el la konektujo, ĉu vi komprenas? Kiam oni klopodas rekonekti tiun komputilon, tiam la eroj de la komputilo jam ne funkcias. Vi mallumigas trilionojn da ĉeloj. Vi estis tute emociema, transformiĝanta por la nestigo, viaj ĉeloj sekreciadis amason da neŭrontransmisiiloj, endorfinoj... Kiam vi eltiras la konektilon kaj elsuĉas la feton, okazas subita interrompo de neŭrontransmisiiloj, ĉar ekfalas progesterono, kiu gvidas ilian sekreciadon. Pro tio, eblas suferi depresion dum la tuta cetera vivo. Se virino havas iom grandan inklinon al depresio, tiam



Revuo Catolicismo

> **"Se mi komencas ĉi tie paroli pri tio, kion kaŭzas abortigo je via korpa kaj mensa sano, kaj ja ekzistas virinoj, kiuj faras tion plurfoje, tiam vi ne akceptos fari ĝin."**

manko de neŭrontransmisiilo estas ia tragedio, kaj eĉ kuraciloj ne sukcesas restarigi tion.

**BV — Ĉu do okazas fortega reago en la korpo mem, kun altgrada krudeco?**

**D-rino Lilian Eça** — Kompleta krudeco! Tio ne estas emancipiĝo... ĉu emancipiĝo estas jen forsuĉi sian feton? Ne. Laŭ scienca vidpunkto, tio estas retroiro. Se vi ŝatas vian korpon, se vi amas vin mem, viajn neŭrontransmisiilojn, viajn

shutterstock.com



neŭronojn, vian cerbon, mi konsilas al vi pripensi la aferon trilionojn da fojoj. Krome, vi riskos infekton, vi riskos forsuĉi ion plian ol necese, ĉar kiam vi deziros patriniĝi, eble vi jam ne havos tavolon de endometro. Se vi forigas tavolon de endometro, tiam la feto perdas sian kapablon moviĝi; aŭ eĉ okazas pli granda ebleco reteni la feton en la salpingo; [tiuokaze] oni devas forigi ne nur la feton, sed ankaŭ la salpingon. Se mi komencas ĉi tie paroli pri tio, kion kaŭzas abortigo je via korpa kaj mensa sano, kaj ja ekzistas virinoj, kiuj faras tion plurfoje, tiam vi ne akceptos fari ĝin.

**BV — Ĉu ankoraŭ mankas informado?**

**D-rino Lilian Eça** — Bedaŭrinde brazilanoj ĝenerale malhavas informojn kaj pro tio ili ne batalas por siaj rajtoj. (...) Do, abortigi ne signifas protekti. Kuracisto ĵuras, ke li favoros vivon, de komenco ĝis la fino, kaj poste li jen forigas vivon? Tio estas kontraŭdiro. Oni devos krei ian novan universitaton, se tia leĝo envenos Brazilon. Ni ne estas preparitaj eĉ por plenumi ultrason-ekzamenojn al gravedulinoj, pensu do pri tiaj ekzamenoj por forigi idojn. Sen organizo por naskiĝo de beboj, ĉar ili estas multaj, do pensu pri la atendovico por abortigoj? Mi tute kontraŭas. Ni ja devas starigi pli da hospitaloj, kun pli da flegado, pli bonaj salajroj por profesiuloj; ni devas havi leĝon por sano.

**BV — Ĉu landoj, kiuj permesas abortigon, sentas ties rezultojn?**

**D-rino Lilian Eça** — Evoluintaj nacioj, kiel Danlando, kie leĝo permesas abortigon, havas grandan kvanton da memmortigintaj virinoj. Jen estas precize la manko de neŭrontransmisiilo. Homo forigas sian propran vivon nur kiam li suferas tre fortan depresion. (...) Krom mia esplorado pri signaloj en ĉeloj, mi de multaj jaroj akompanas, dum laborado ĉe Centro de Aktualigoj pri Sano, la konduton de virinoj, kiuj abortigis. Ni havas interdisciplinan laborgrupon — psikiatroj, flegistoj, biologi-medicinistoj, dentistoj... Ne mi sola alvenis al tiaj konkludoj, ili estas frukto ankaŭ de akompanado fare de aliaj profesiuloj.

**BV — Kaj kion vi diras pri interrompo de gravedeco de senencefalulo*?**

**D-rino Lilian Eça** — Eble vi ŝokiĝos, sed jen mi diros, kion mi pensas... Mi trovas tion suferiga, ĉar oni ĉiam deziras, ke niaj idoj estu tute sanaj, kompreneble, sed se mi plenumas ultrasonan ekzamenon kaj trovas, ke mia ido estas sencerba, tiam mi trovas multe pli sane doni eblecon travivi funebron ol liberiĝi de tio per abortigo. Tiuokaze, ni scias, ke ĝia vivo estos malpli longa. (...) Ĝi estas la samo, ekzemple, se vi havas sanan idon kaj morgaŭ ĝi suferos akcidenton, ne plu estos sana. Tiu patrino restos ĉe ĝi, ŝi kunvivos kun tiu ido, kiu bezonos ŝin ĉiutage. Ekzistas kontraŭdiroj. Se mi havas en mi idon, kaj ĝi malsanas, tiam mi forigas ĝin? Tute ne, tiuokaze oni amas eĉ pli! (...) Ekde la momento, kiam vi gravediĝas, jen troviĝas la respondeco pri tiu estulo en vi. ●



***Senencefala** — Havanta specon de malofta misformiĝo de la neŭra tubo, tiel ke mankas parto de la encefalo kaj de la kranio de la feto.


# TEMPLO DE BONA VOLO

## Unu el la Sep Mirindaĵoj de Braziljo/DF - Brazilo


Kun la apogo de Virinoj, la direktoro-prezidanto de LBV, José de Paiva Netto, fondis la Templon de Bona Volo (TBV). Aklamita de la popolo kiel unu el la Sep Mirindaĵoj de Braziljo/DF, Brazilo, ekde kiam ĝi estis fondita, en 21/10/1989, ĝi jam ricevis pli ol 23 milionojn da pilgrimantoj. Laŭ oficialaj datumoj de Ŝtata Sekretariejo pri Turismo de la Federacia Distrikto (Setur-DF), ĝi estas la plejmulte vizitita monumento de la ĉefurbo de Brazilo. Apud Parlamundi de LBV kaj ĝia administra sidejo, la Templo de Paco konsistigas la Ekumenan, Arkitekturan Ensemblon de Legio de Bona Volo.

**VIDEO**
QR Code: Fotu la kodon kaj ekkonu la ĉefajn ĉambregojn de TBV.






Vizitu ĝin! SGAS 915 – Lotes 75/76



Informoj: (+5561) 3114-1070 • www.tbv.com.br




# Spirita Inteligento

Kial *la rigardo trans la intelekto*, proponata de la ĉefgvidanto de LBV, ebligas lernadon al ĉiuj

**Paula Suelí**

Arkivo BV



Vivian R. Ferreira

**Paula Suelí**, diplomiĝinta kaj licenciulino pri Historio ĉe Universitato de San-Paŭlo kaj aktivulo de la Ekumena Junularo de la Bona Volo de Dio.

Ĉiu persono estas lernkapabla. Multaj fakuloj pri Pedagogio fidis je tiu idealo kaj dediĉis sian vivon por trovi vojojn, kiuj povos aliigi tian aspiron al realaĵo, eĉ en la plej postulemaj scenejoj edukaj kaj sciencaj. En Usono, instruistino **Anne Sullivan** (1866-1936) post dediĉi sin al sia lernantino kaj poste amikino **Helen Keller** (1880-1968), knabino kiu ne parolis, ne aŭdis nek vidis, ebligis ke ŝi vidu la mondon per la manoj; kaj instruis al ŝi kiel paroli kaj aŭdi laŭ la filozofio kaj socia aktivismo. La itala kuracistino kaj pedagogiistino **Maria Montessori** (1870-1952) pionire instruis al handikapaj infanoj kaj malsataj knaboj. La brazila edukanto kaj filozofo **Paulo Freire** (1921-1997) igis malriĉajn virojn kaj virinojn, forlasitajn kaj nelego-kapablajn, kredi je sia propra potencialo kaj je la estonteco. **Jesuo**, la Ekumena Kristo, antaŭis ĉiujn tiujn kaj lasis Siajn instruojn al ĉiu individuo inter malriĉaj, riĉaj, malsanaj, sanaj, forlasitaj, marĝenitaj, infanoj, maljunuloj...

Kaj la manko de kompreno pri la amplekseco de la pedagogia agado de la Kristo definitive kontribuas al tio ke, malgraŭ tiom da progresoj en Edukado, ia profunda mistero konserviĝas en la mondo: kiel permesi ke ĉiuj lernu? Instruistoj, teoriistoj, gepatroj, geavoj, fine, ĉiaj edukantoj, plu strebas malkovri kiel igi lernadon io pli ol la simpla instruo, la ripeto de enhavoj, nek ĉiam komprenataj de la edukato kun klareco kaj saĝeco. Kvazaŭ ne sufiĉus la defioj propraj al edukado — kiel la malfruo en ĉiuj lernejoj de la enkonduko de progresoj teknologiaj, sciencaj kaj eĉ humanaj, por ne paroli pri la ĉeesto de perforto en la lerneja medio —, oni devas konsideri aliajn motivojn same gravajn, kiuj igas lernadon nealirebla al multaj.

## Venko de baroj

Inter la plej kruelaj malhelpoj al lernado troviĝas la sociaj kaj ekonomiaj heredaĵoj: infano, kiu ne ricevas ĉiujn ĉiutagajn manĝojn, povos alfronti gravajn problemojn dum la korpa, kaj precipe neŭrologia formado malkiel tiu kiu disponas je ekvilibra nutrado. En Brazilo, ripetiĝantaj statistikoj montras ke knabino aŭ knabo el nigra familio ankoraŭ suferas pli grandan riskon antaŭtempe forlasi la lernejon, ol la filoj de blankaj gepatroj. Malegalecoj kiuj venigas en la universitatojn kaj lernoĉambrojn jenan teorian kaj praktikan defion: "Kiel estigi kondiĉojn por ke ĉiuj personoj lernu?".

Ene de tiu kompleksa kunteksto, troviĝas la eduka laboro de Legio de Bona Volo. Per aplikado de la Pedagogio de Amo kaj Pedagogio de Ekumena Civitano, LBV tenas en la lernejo, dum la tuta ciklo de baza edukado, infanojn kaj adoleskantojn, kiuj ne povis ricevi el la familianoj librojn, kursojn kaj edukajn ludilojn. Junuloj formitaj en la edukejoj de tiu Institucio sukcesis



Arkivo BV

Helen Keller (maldekstre) kaj ŝia mentorino Anne Sullivan.


Vivian R. Ferreira

atingi la superan edukadon kaj profesian realigon kaj, kiel civitanoj, plurfoje reprezentis la unuan generacion de familioj (kaj eĉ komunumoj), kiu ricevis tian oportunon. Tiel, ili superis la barojn de mizero kaj de alirmanko al altkvalita lernado. Kiel LBV ebligas lernadon fronte al tiom da malfacilaĵoj?

En 1981, okaze de intervjuo al la veterana itala ĵurnalisto, radikiĝinta en Brazilo, **Paulo Parisi Rappoccio**, la kreinto de la eduka linio de Legio de Bona Volo, José de Paiva Netto, defendis *"la bazan neceson aldoni al la intelekta racio la saĝecon, kiu estiĝas en la koro de la homo. Jes, ĉar ankaŭ estas la inteligento de sento, de emocio kaj, pli ol tio, la* ***Spirita Inteligento****, veninta el Mondo ankoraŭ nevidebla al niaj materiaj okuloj, pro motivoj de agorditeco. Neniu mortas. Ni plu vivas tra Eterneco"**[1]. Pro sia revolucia enteno, tiuj vortoj tuj entuziasmis edukantojn enlande kaj alilande, per la publikigo de tekstoj tradukitaj al pluraj lingvoj.

Tiutempe, la aliro al lernejo eĉ ne prezentiĝis kiel subjektiva rajto de ĉiu civitano (tio estos konkero de la Konstitucio de 1988), sed la aserto de la ĉefgvidanto de LBV jam levis la percepton de *inteligenteco* al nova stadio, multe pli vasta. Laŭ la edukanto, menciindas ankaŭ la Emocia Inteligento, por esti prilaborita, kaj plie la Spirita Inteligento, por esti rekonata kaj disvolvita. Lia percepto sekvis laŭ la kontraŭa direkto de simplemaj klasifikoj kutime uzataj tiutempe, ĉar inteligenteco estis ĝenerala koncepto ofte limigita al la logikaj kaj lingvaj kapabloj de la individuo, kaj ĉi tiuj al simplema kategoriigo: oni estis aŭ "inteligenta" aŭ "stulta".

Du jarojn poste, en 1983, la psikologiisto **Howard Gardner**, profesoro de Universitato Harvard, en Usono, lanĉis la Teorion pri Multoblaj Inteligentoj, registrante sep tipojn de inteligentecoj en la homo, kio kondukis la klasifikon akademian, socian kaj tiun uzatan de la IK (intelekta kvociento) al la finoj de iliaj tagoj. Tiam, Gardner identigis la superregon de unu aŭ pli el la sekvaj inteligentoj: logika-matematika, lingva, muzika, bildo-spaca, korpo-kineta, interpersona kaj intrapersona.

En 1999, reviziante la propran studon, Gardner listigis du pliajn inteligentojn: tiun naturalisman kaj tiun ekzistisman, aŭ spiritualecan. Pri la dua, li sugestis ke la studo pri la regno de la spiritaj aferoj estas tiel valida kiel tiu de matematiko, kiu, malgraŭ ĝia abstrakteco por multaj homoj, konsistigas rekonatan fakon de la homa


> "Jesuo, la Ekumena Kristo, antaŭis ĉiujn tiujn kaj lasis Siajn instruojn al ĉiu individuo inter malriĉaj, riĉaj, malsanaj, sanaj, forlasitaj, marĝenitaj, infanoj, maljunuloj..."

*[1] Ĉi tiu penso de Paiva Netto troviĝas en lia libro *Urĝas Reeduki!*, 2010, p. 169, publikigita de eldonejo Elevação.
*[2] Konsideroj de la psikologiisto Howard Gardner en *Inteligenteco: reformulita koncepto*, 2001, p. 71.
*[3] Difino de la psikologiisto Howard Gardner en la verko *Inteligenteco: reformulita koncepto*, 2001, p. 79.

inteligenteco*[2]. Krome, eĉ se li preferas konservi nur ok el la inteligentoj rekonataj laŭ lia teorio, la studemulo konsideras la ekzistisman inteligenton ia *"versio de tiu spiritualeca"*, pro la evidentaĵo de *"potencialo ĉe iu specio por envolviĝi kun transcendaj zorgoj, kapablo kiu povas esti vekita kaj disvolvita sub iuj cirkonstancoj"**[3].

Konsidere al tio ke *"dum momento ni estas en korpo, sed por ĉiam ni estas Spiritoj"**[4], la Ekdukado kun Ekumena Spiritualeco, aplikata de Paiva Netto, kiam li pledas por la Pedagogio de Amo (direktata al infanoj ĝis 10-jaraĝaj) kaj Pedagogio de Ekumena Civitano (ekde 11-jariĝo), prezentas la Spiritan Inteligenton kiel unu el ĝiaj fundamentaj premisoj. Dum la instruado, ĝi gvidas specialan rigardon al tio nemateria, nevidebla, sed samtempe nedisigebla, en la homo kaj en la Universo: la spirita origino de la vivo.

La Ekumena Spiritualeco prezentiĝas almenaŭ laŭ du vastaj sencoj. La unua el ili konsistigas ĉiujn plej noblajn valorojn kaj fundamentojn de la Animo, aperantajn en ĉiu homo, sendepende de tio ĉu li konsideras sin religiema aŭ ne. Pri tio skribis la ĉefgvidanto de LBV: *"Oni ne povas por ĉiam bari la manifestadon de tio kio naskiĝas kune kun la individuo, eĉ kiam temas pri ateisto:* ***la konscion pri Religieco****, kiu esprimiĝas laŭ plej variaj altruismaj formoj"**[5].



La dua senco estas tiu pri rekono de la tiel nomata Nevidebla Mondo, la origino de la homa Spirito. Nuntempe la konsiderado pri ekzisto de tiu spirita realaĵo, tre menciita en la tradiciaj religioj, transiras la kampon de religio. Konsideri la ekziston de aliaj dimensioj, nome preter tiu materia, jam ne plu estas motivo por ekmiro. La moderna fiziko inkluzivas

> "La intelekta eminenteco gravas, sed ĝi ne estas la limigo por Edukado kun Ekumena Spiritualeco."

*[4] Maksimo de Paiva Netto aperinta en lia libro *Ni ĉiuj estas Profetoj*, 2009, p. 128.

*[5] Teksto de la ĵurnalisto Paiva Netto por la gazeto *Folha de S.Paulo*, de la 9a de aŭgusto 1987 kaj publikita en *Urĝas Reeduki!*, 2010, p. 150.

Vivian R. Ferreira



## Rajto je Edukado

Laŭ juristoj, ekde 1948 tiu rajto estis antaŭvidita en la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj, okaze de ĝia adopto fare de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj (UN); sekve, temas pri homa rajto. La brazila registaro, eĉ se malfrue, ekprioritatis la rajton al edukado per proklamo de la Federacia Konstitucio de la jaro 1988. Sed nur post la redemokratiigo, la leĝofarantoj venigis al la popolo edukadon kiel socian rajton.

Edukado kiel socia realaĵo estas reliefa en la Konstitucio mem, kiu ĝin anoncas kiel ĉies rajto, devo de la Ŝtato kaj de la familio, sub la triobla funkcio garantii la plenan realigon de la homo, enkonduki lin en la kuntekston de la Ŝtato de Demokratiaj Civitanaj Rajtoj kaj lin kapabligi por la labormerkato. Samtempe edukado reprezentas mekanismon de persona disvolviĝo kaj ankaŭ de la socio mem, kie la individuo estas entenata.

sekcion kiu strebas klarigi, laŭ M-Teorio[*6] — la teorio pri la kordoj kaj la teorio pri superkordoj, inter aliaj modeloj de universo —, la ekziston de eĉ 11 dimensioj.

## Bonaj rezultoj

Ĝuste per tiu pli vasta kompreno pri la homa propreco nomata "inteligento" baziĝas la laboro realigata en la lernejoj de LBV, nome konvinko pri tio ke "ĉiu lernanto estas la ideala lernanto", dotita de senlimaj kapabloj kreemaj, produktivaj kaj solidaraj.

Havante la instruojn de Jesuo, la Ekumena Kristo, kiel centran pedagogian referencon, la Edukado kun Ekumena Spiritualeco postulas esploron kaj disvolvon de sennombraj kapabloj, kiujn ĉiu individuo portas en si, ne nur rilate la kognan kapablecon, sed ankaŭ rilate tiun trezoron, kiun la personoj portas en sia Spiriteco, tiun kiu transcendas genetikajn kaj kulturajn trajtojn, socian formadon kaj ekonomian situacion.

La "spirita heredaĵo", laŭ diro de la edukantoj de Legio de Bona Volo, estas ĉiuj spertoj kaj scioj ekzistantaj en la Animo, Spirito aŭ Konscienco (la termino varias laŭ onia kredo aŭ nekredo), kaj transiras la personajn kapablojn, kiam submetitaj al limigantaj cirkonstancoj: iu materia senigo, handikapo aŭ emocia traŭmato. Tiu potencialo povas esti vekita per edukado, kondiĉe ke la stimuloj al lernado atingu ĉiujn kaj estu dinamike reviziitaj kaj plibonigitaj, kaj krome oni konsideru la diversecon ĉeestantan en ĉiu lernejo, klaso, estulo. La defio estas grandega kaj daŭra, sed la motivigo de la edukantoj de LBV estas estigi profundan lernadon, kritikan

[*6] **M-Teorio** — Konsiderata kompleksa, M-teorio (multuniverso) akceptas ke la Universo ne povas esti klarigita matematike, se oni ne konsentas pri la ekzisto de universoj paralelaj al la nia. Ĝi povas esti nomata ankaŭ "Teorio pri la Universaj Superbobeloj": nia tuta universo (kun pli ol 250 miliardoj da galaksioj) estus kvazaŭ "bobelo" ŝvebanta flanke de aliaj sennombraj bobeloj, ĉiu el ili kompleta universo, egala aŭ pli granda ol la nia. Laŭteorie, ĉi tiu universo formiĝis danke al la kolizio inter du aliaj, eĉ pli grandaj kaj pli malnovaj. Laŭ la teoriistoj, tio ne signifas ke ili detruiĝis dum la kunfrapiĝo, sed nur "tuŝetis" unu alian; sekve, el tiu tuŝo formiĝis nia universo.

[*7] Deklaraĵo de la edukisto Celso Antunes publikita en *Urĝas Reeduki!*, 2010, paĝoj 224 kaj 225.

kaj solidaran, ĉe la lernantoj ankaŭ pri ili mem, tiel ke ili komprenu plibone la regulajn lernobjektojn necesajn por ilia sukceso en la vivo kaj por ke ili konstruu pli justan mondon por ĉiuj. Tial, pere de propra metodologio kaj de pedagogiaj rimedoj pli kaj pli precizaj, la eduka gvidlinio de LBV jam atingis signifajn rezultojn, kiel indico nulo pri antaŭtempa forlaso de lernejo nulo kaj medio en kiu oni travivas la Kulturon de Paco.

La renoma brazila profesoro, verkisto kaj konferencisto **Celso Antunes**, esploristo de la temo pri multoblaj inteligentoj, emfaze parolis pri la agadoj de LBV, en la programo *Edukado en Debato*. *"Delonge la Bona Volo eniris en miajn amikecojn. (...) Mi havis la okazon legi ĉiun verkon de Paiva Netto, kiu venis en miajn manojn kaj tial mi kredas — atribuu aŭ ne al tiu celo la nomon de multoblaj inteligentoj — ke ĝi plene enkadriĝas en tiu koncepto, ĉar efektive ĝi neniam ŝajnis al mi ke por vi estas zorginda la eksponenta disvolviĝo de tiu lernanto, kiu estos la 'eta geniulo', sed la kompleta formado de la persono. Kaj ĉar mi plene kredas je tiuj edukaj vojoj, mi ripetas ke mi parolas al Legio de Bona Volo ne nur kiel intervjuanto, sed kiel persono kiu vere sentas sin identigita kun la filozofio kaj linio de ĝia laboro"*[*7], li diris.



Vivian R. Ferreira

La intelekta eminenteco gravas, sed ĝi ne estas la limigo por Edukado kun Ekumena Spiritualeco. La nuntempa konkura scenejo postulas ke la persono estu brile intelekta, sed nepras ankaŭ scii *"leviĝi de inteligenteco al saĝeco"*, kiel asertas la edukanto Paiva Netto, dum verkado pri tiu noviga pedagogio. Temas pri defio dezirinda kaj ebla. Tiucele, li direktas nin al tiu nova horizonto: disvolvo de la Spirita Inteligento, *"ia rigardo trans la intelekto"*.

# LA DU FUNDAMENTOJ

(Adapto de la Evangelio de la Ekumena Kristo, laŭ Luko, 6:47 ĝis 49)



Jesuo instruis al Siaj disĉiploj kaj al la homamaso kiu sekvis Lin:
"Ĉiu kiu venas al mi kaj aŭdas miajn vortojn kaj ilin plenumas similas al prudenta homo kiu, konstruante sian domon, fosis tre profunde kaj starigis la fundamenton sur la roko. Tiel, kiam okazis inundo, la akvo forte batis kontraŭ tiun domon, sed ne sukcesis faligi ĝin, ĉar ĝi estis konstruita sur roko.
"Sed tiu, kiu aŭdas miajn vortojn kaj ilin ne plenumas, similas al homo kiu konstruis sian domon sur moviĝanta tero, sen la fundamento. Kiam la akvofluo de la rivero forte batis kontraŭ la domon, ĝi tuj falis, kaj granda estis ĝia ruino".



Mi komprenis ke esti prudenta estas tiu homo kiu havas Fidon en la koro, kiu preĝas ĉiutage, kiu havas kuraĝon kaj neniam rezignas. Li ĉiam sekvas antaŭen, eĉ kun sufero, ĉar li kredas je Jesuo, kredas je la Gardanĝelo, kaj sukcesas venki la malfacilaĵojn. Tial, mi estas certa ke, kun la helpo de Jesuo, ni ĉiuj venkos: la Soldatetoj de Dio, niaj gepatroj, ĉar Jesuo estas pli granda ol ĉiuj ŝtormoj. Li montras al ni kiel esti feliĉaj, per la firma konstruo, forta kaj sekura. Tial, ni ne povas malkuraĝiĝi, kontraŭe nia domo dronos en la sablo. Kaj la Domo pri kiu parolas Jesuo estas la Spirita Domo, tio kion ni lernas per Li, per Lia mesaĝo, kiu ĉiam vigligas nin.

**Matheus Henrique Sudário, 10-jara.**
**Manaŭso, Brazilo.**



(Kiu konstruas) la domon sur la roko estas tiu homo, kiu plenumas simplajn kaj bonajn agojn. En la kriza momento, li estas sufiĉe forta por elteni malfeliĉojn. Tiel, la problemo ne aperas plene al li, kaj se ĝi aperas, li estas preparita, jam venkas! Male, kiu konstruas la domon sur la tero (moviĝanta) estas tiu, kiu agas malbone, ne sufiĉe sekvas la instruojn de Jesuo. Tiel, kiam la problemo aperas, li estas malforta. Tio estas iometo pri kio mi lernis. Mi tre ŝatis. Tio estas bonega por mi, kiu havas ankoraŭ multon por lerni.

**Luan Henrique Alves, 9-jara.**
**Belorizonto, Brazilo.**



# PREĜO DE INFANO

*Rita de Cássia Mineto*



Bona Ĉiela Patro
Restu ĉiam ĉe mi,
Helpu al mi Vin ami pli kaj pli.
Ke mia infana koreto estu pura
Kaj ne estu loko por koleremo.
Ke miaj okuletoj turniĝu nur al la Bono.
Ho Dio!
Forigu de mi ĉiajn pensojn pri malbono kontraŭ miaj fratoj.
Ne permesu ke el mia buŝeto eliru iu mensogo aŭ malbelaj vortoj.
Ke la inteligento, kiun Vi donis al mi en ĝusta kvanto, uziĝu favore al la homaro.
Helpu min ami ĉiujn miajn fratojn, amikojn kaj malamikojn, bonajn kaj malbonajn, konatajn aŭ ne, kiujn mi renkontos dum mia tuta vivo.
Helpu, Sinjoro, ke mi neniam vundu la koron de miaj gepatroj, kiuj zorgas pri mi kun tiom da kareso kaj amo.
Sinjoro, donu al mi volon kaj kuraĝon por plenumi Vian Ordonon, farante al la aliaj tion kion mi volas, ke la aliaj faru al mi.
Tiel estu!

# AKTIVECOJ


## Ludo de 7 eraroj





**Iru ni al la floroj**



**RESPONDOJ:**
Iru ni al la floroj
Respondo: 3
Ludo de 7 eraroj




Ni atendas Vin! Trovu nian paĝaron en la sociaj retoj.
Se Vi ankaŭ volas ricevi niajn bultenojn,
skribu al esperanto@bonavolo.com.

www.facebook.com/BonaVolo

www.twitter.com/BonaVolo

www.youtube.com/PortaloBonaVolo

BONA VOLO.com